La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2026. №2

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2026. №2 (328)

***La Ondo de Esperanto* aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.**
Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.
Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.
Eldonas kaj administras: Halina Gorecka
Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)
Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro)
Peter Baláž
Stanislav Belov
István Ertl
Irina Gonĉarova
Povilas Jegorovas
Wolfgang Kirschstein
Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando
Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com
Retejoj: https://esperanto-ondo.ru, https://sezonoj.ru
Abontarifo por 2026

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 850 rubloj
Amiko: 30 eŭroj, 34 usonaj dolaroj, 1700 rubloj
Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)
Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)
Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)
Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)
Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2026, №2 (328).
Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.
Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.
Подписано в печать: 9 июля 2026 г.

© La Ondo de Esperanto, 2026

En ĉi tiu numero

Bazaj informoj pri “La Ondo de Esperanto” 2
En ĉi tiu numero 3

Intervjuo. 5
Paweł Fischer-Kotowski. Mi vivas momente ekster la Esperanta tumulto: Intervjuo kun Ionel Oneţ. 6

Lingvo 9
Pri la esprimo “tiel nomata” 10
Probal Dasgupta. “Mi akuzativas…!” diris Émile Zola 17
Sabine Fiedler. Novaj esploroj pri konstruitaj lingvoj. 27
Chistopher Gledhill. Hazardaj kaj intencaj paronimoj: la rolo de paronimio en Esperanta vortfarado kaj terminologio. 33
“Esperantologio / Esperanto Studies” 44
Ilona Koutny. Loko kaj enhavo de esperantologio fone de interlingvistiko 45
Marc van Oostendorp. Eviti rimon en Esperanta prozo. 54
Aleksander Korĵenkov. La Ondo de ... Esperantologio 58
Ryszard Rokicki. Rimarkoj pri interpretoj de la Fundamento. 59
Klaus Schubert. Hugo Schuchardt, frua interlingvisto. 66
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Interlingvistiko kaj esperantologio en “La Ondo de Esperanto” 73
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Interlingvistiko kaj esperantologio en “Ruslanda Esperantisto” 77
UK-111: La 48a Esperantologia Konferenco. 78

Eventoj 79
Tim Owen. Jubilea Brita Kongreso: 50 jaroj de EAB 80
Iraneide Morais. Brazila Kongreso: “Esperanto kaj indiĝenaj lingvoj”. 83
Paulo S. Viana. La 36a Esperanto-renkontiĝo de la ŝtato Rio-de-Ĵanejro. 84
Andreas Diemel. Dulanda kongreso en Olomouc. 85
Ladislav Kovář. Fervojistoj kongresis en Serbio 86
Filip Ivančić. La 14a Kongreso de kroataj esperantistoj. 87
Torine Raharisoa. Malagasa Seminario – ponto inter la koroj 88
Alessio Giordano, Giulia Costanzi. Kio okazis dum IJF 2026? Jen eta resumo . . . 90
Ulrich Matthias. Esperantaj Tagoj en du Mondaj Kulturaj Heredaĵoj. 91
Snaiguolė Malych. Litovio: Somera kunflugo kun eminentaj gastoj. 93
Andreo Grossmann. Jam la 91a staĝo de Espéranto France-Est. 95
Michel Basso. “Esperante Ludu” ĉe la Strata Festivalo. 95
Irina Gonĉarova. APERo-19, eĉ pli sukcesa ol la antaŭaj 96
Parker Adey. MeKaRo 2026 97

Takemori Hirotoshi. La 74a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo. 98
Lu Wunsch-Rolshoven. PRINTEMPE en Wiesbaden 98
Aŭstrio agnoskis Esperanton 99
Aleksander Korĵenkov. Graco: Pli ol mil kongresanoj 100
Aleksander Korĵenkov. Raportoj pri ĉiuj Universalaj Kongresoj ekde 1991 . . . 100
La Kongresa Libro aperis 101
La 113a UK okazos en Kaŭno 101
Koncize (9 informoj) 103
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas 104

Arkivo 106
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en julio 2026. 107

Kulturo 111
Paulo S. Viana. Turka marŝo 112
Debra Hamel. Promenado en la parko 114
Nikolao Gudskov. Etenditaj sentencoj kaj paraboloj (Recenzo: Julian Modest. “La vendisto de feliĉo”) 116
Toño del Barrio. “Kien ci iras?” Ĉu Nova versio aŭ nova traduko? (Recenzo: Henryk Sienkiewicz. “Kien ci iras? Romano pri la tempo Nerona”) 117
La respondo de Sergio Pokrovskij 121
Paŭlo Moĵajevo. La albumo, aŭskultinda je ĉioma ajn horo! (Recenzo: Kaj Tiel Plu. “Je la kvara”) 128
Flo Martorell. La Roko: Nova albumeto de Martin & la Talpoj 129
Humphrey Tonkin. Ili ĉiuj iris en la regnon de lumo. 130
Biblioteka Apogo Bachrich: alvoko 2026 131
Literatura Foiro, 2026, №341 132
Retbutiko lanĉita, gajnintoj de INK-5 premiotaj. 132

Mozaiko 133
Stanislav Belov. Estas tiel varmege ĉi tie, ke eblas rosti blankan ursonon!. 134
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj 135
Perantoj de “La Ondo de Esperanto” 136

Same kiel en marto 2019, antaŭ vi estas “La Ondo de … Esperantologio”, ĉar pli ol duonon de la revuo okupas tekstoj interlingvistikaj kaj esperantologio. Parte pro tio, ke la fakaj tekstoj postulis pli da redaktotempo ol kutime, parte pro tio ke la aliro al la reto (“danke” al la koncerna ŝtata departemento) en Ruslando nun estas komplikita, parte pro paneeto de la komputilo kaj parte pro la enorma varmego juniofine, – pro ĉio ĉi ni pretigis ĉi tiun “Ondon” kun pli ol semajna malfruo. Ni petas vian pardonon pro tio.

Sed post la varmego venis pluvoj, kaj sur nia kovropaĝo vi vidas la pentraĵon “Post la pluvo” (1935) de Aleksandr Gerasimov.

Intervjuo

La 29an de majo 2026 sepdekjariĝis Ionel Oneț – elstara rumana esperantisto, kiu dum pli ol dudek jaroj deĵoris kiel la libroservisto en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Legu intervjuon kun li en la sekvaj paĝoj.
(Foto: Paweł Fischer-Kotowski)

Mi vivas momente ekster la Esperanta tumulto

Intervjuo kun Ionel Oneț

Antaŭ 70 jaroj, la 29an de majo 1956, naskiĝis Ionel Oneț – elstara rumana esperantisto, kiu antaŭ kelkaj monatoj finis sian pli ol dudekjaran laboron ĉe UEA. Li volonte konsentis respondi la demandojn de Paweł Fischer-Kotowski.

Por multaj estas konate, ke vi plu laboris en la Libroservo de UEA ankaŭ post la atingo de la laŭleĝa emerita aĝo. Do, kiam vi definitive emeritiĝis kaj ĉesis labori? Kaj ĉu tio estis por vi feliĉa momento aŭ ĉu vi bedaŭris postlasi vian laboron de la lastaj jardekoj?

Jes, iom pli ol tri jarojn post la laŭleĝa aĝo por emeritiĝo en Nederlando, mi finfine – je la granda ĝojo de iuj – ĉesis labori iom post la komenco de la nuna jaro. Post pli ol 23 jaroj da laboro samloke, ne estis facile forlasi lokon, kiu estis por mi pli ol laborloko. Aldone, rompiĝis kontaktoj kun karaj homoj. Aliflanke, ĉesis rilatoj kun aliaj – afero ne nepre malbona. Ĉio ĉi estas parto de la homa vivo.

Kio okazas pri la Libroservo de UEA post kiam vi foriris? Ĉu oni elektis vian posteulon?

Rilate al la servoj proponataj de UEA kaj al iliaj prizorgantoj, prefere kontakti la organizaĵon mem. Ĉar mi ne plu laboras por UEA, mi preferas ne respondi al demandoj ligitaj al ĝi. Mi esperas ke – en ne tro fora estonteco – oni trovos solvon al la diversaj problemoj/malfacilaĵoj, kiujn UEA alfrontas. Tio certe povas okazi ankaŭ sen mia kontribuo/kunlaboro.

Espereble vi ĝuas vian emeritan tempon! Ĉu Esperanto daŭre estas parto de via vivo? Pluraj homoj aktiviĝas en la komunumo nur post la emeritiĝo, sed kion faras iu, kiu aktivis – sen troigo – la tutan vivon antaŭ la emeritiĝo?

De 45 jaroj Esperanto estas integra parto de mia vivo. Estus tre malfacile, se entute eble, abrupte rompi kun tiu parto. Por momento, eĉ se en ia izoleco, mi daŭre esperantumas. Laŭ la tempo, mi kolektis, en miaj tri landoj, belan kvanton da libroj, “la iam legotan libraron”, kiun mi finfine atakis kaj ĝuas. Libroj estas paciencaj kaj fidelaj amikoj.



UK-90 en Vilno (2005). En UKoj Ionel ne kongresumis, sed laboris (Foto: Stano Marček)

Vi emeritiĝis kiel libroservisto, sed krome vi estas ankaŭ eldonisto. Ĉu ankaŭ pri tiu tasko vi rezignis aŭ ĉu vi daŭre aperigas novajn Esperanto-librojn?

Momente la “eldona fako”, por tiel diri, stagnas ĉe mi same kiel ĉe UEA. Kiom longe mi ne scias. La nuna stato de la Esperanta libromerkato ne estas aparte esperdona, por milde diri.

Kiam mi intervjuis vin antaŭ kvin jaroj, okaze de via 65-jariĝo, vi rakontis pri via enorma projekto pri granda rumana-Esperanta vortaro. Kiel vi progresis pri tiu laboro? Kiam vi planas atingi la literon Z?

Mi jam enkomputiligis ĉiujn kapvortojn (momente pli ol 63 mil) de la ĉefa rumana referencvortaro (Dicţionarul Explicativ al Limbii Române = la klariga vortaro de la rumana lingvo). Mi laboris laŭ eldono el la jaro 1990. Sekvas nun revizio laŭ la plej nova eldono de tiu vortaro. Mi ja atingis la Z de la leksiko, sed ne la Z de la laboro.

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Lingvo

La 30an de majo Probal Dasgupta sendis al ni sian artikolon «“Mi akuzativas…!” diris Émile Zola» kaj portretfoton, kiu devus garni la artikolon. Sed post du tagoj, la 1an de junio, li ne vekiĝis, kaj lia foto estas nigre kadrita.
Legu la plej lastan artikolon de Probal sur la paĝoj 17-26.

Pri la esprimo “tiel nomata”

La 7an de aprilo 2026 la Akademio de Esperanto aprobis deklaron pri la esprimo “tiel nomata”. Voĉdonis 40 akademianoj, 28 aprobis (70 %), 5 voĉdonis kontraŭ (12 %) kaj 7 voĉdonis sendecide (18 %).

En tiu esprimo la verbo *nomi* signifas proksimume *signi ion aŭ iun per distinga vorto kutime uzata*, t.e. uzi pli-malpli arbitran ***etikedon*** (nomon, kromnomon, priskribon, titolon, funkcion…), asignitan al la priparolata persono aŭ objekto. Tiun lastan ni konvencie nomos la ***etikedito***.

Kiel iĝos klare en la analizo de la ĉi-sube citotaj ekzemploj, en la vortokombino **“tiel nomata”** la adverbo *tiel* resendas al tiu *etikedo* kaj ofte portas ian subkomprenitan nuancon koncerne la rilaton inter la *etikedito* kaj ties etikedo.

Tiu vortokombino aperas en **du malsamaj uzmanieroj**. Ambaŭ estas zamenhofaj, tute kutimaj kaj vaste uzataj de la plej frua Esperanta epoko. Estas utile konscii pri tiuj du uzmanieroj por ĝuste interpreti la frazojn, en kiuj ili aperas.

La unua uzmaniero

En la unua uzmaniero la adverbo *tiel* en la esprimo **“tiel nomata”** resendas al *etikedo* aperanta samfraze, aŭ iom pli for en la kunteksto. Malofte okazas, ke la esprimo funkcias kiel adjektiva priskribo (epiteto) de tuj posta substantivo, sed tiuokaze la substantivo ne povas havi la sencon de *etikedo*: ĝi ja estas komprenenda kiel *etikedito.*

En tiu uzmaniero la esprimo ofte servas por doni klarigon pri la nomado: kiu aŭ kio estas nomata tiel, kaj eventuale kial.

Ekzemple:

(1) En Kopenhago ekzistas strato, kiu havas la strangan nomon “Hüske-strato”. Kial ĝi estas tiel nomata, kaj kion tiu nomo signifas?
[*Fabeloj de Andersen*, trad. Zamenhof, 1916]

(2) Fidela Johano estis lia plej amata servisto kaj estis tiel nomata, ĉar la tutan vivon li estis fidela al sia sinjoro.
[Fratoj Grimm, *Elektitaj Fabeloj*, trad. Kabe, 1906]

En la ekzemploj (1) kaj (2) la esprimo **“tiel nomata”** ne funkcias kiel epiteto de iu ajn substantivo. La adverbo *tiel* resendas al la ĵus menciitaj *etikedoj*: *Hüske-strato* kaj *Fidela Johano*, respektive.

Alidire, en tiuj frazoj la esprimo **“estas tiel nomata”** kompreniĝas simile al: *havas tian (krom)nomon*, do signifas same kiel, respektive: *estas nomata “Hüske-strato”*, kaj: *estas nomata Fidela Johano.* Tamen per uzo de **“tiel nomata”** oni

povas subkompreni, ke ia klarigo pri la *etikedo* estas utila, kvazaŭ la adverbo *tiel* signifus: *per tia nekutima maniero.*

(3) Kiam ili atingis la “Promenejon”, la tiel nomatan restoracion, […] Ivan komencis spiregadi kiel laca ĉevalo.
[Bulthuis, *Idoj de Orfeo*, 1923]

En la supra ekzemplo la esprimo **“tiel nomata”** funkcias kiel epiteto de la substantivo *restoracio* (la *etikedito*) kaj la adverbo *tiel* resendas al la vorto *Promenejo* (la *etikedo*). Uzo de la esprimo **“tiel nomata restoracio”** krome informas nerekte, ke *Promenejo* estas nomo de iu restoracio, do ne tio, kion oni kutime nomas promenejo.

Samsence oni povus diri, ŝovante la epitetan esprimon **“tiel nomata”** post la nomatan objekton: *Kiam ili atingis la “Promenejon”, la restoracion tiel nomatan*,…

(4) Tiu karto ne estas vere blua, sed ĝi estas **nomata tiel** pro analogeco kun la blua turnolumo de policaj kaj sukurservaj aŭtoj.
[Peeraerts, *6000 “rapidaj” SIM-kartoj*, en *Monato*, 2017]

En la supra ekzemplo nenio malhelpus uzi la formon **“tiel nomata”**, sed ial la aŭtoro elektis uzi la formon **“nomata tiel”**, kiu estas same bona. Ankaŭ en ekzemploj (1) kaj (2) la formo **“nomata tiel”** estus uzebla. Se temas pri la ekzemplo (3), tamen, estas nekonsilinde diri **la nomatan tiel restoracion*, sed ne estus gramatike malĝuste diri ankaŭ *la restoracion nomatan tiel.* Alidire oni rajtas anstataŭigi **“tiel nomata”** per **“nomata tiel”**, krom kiam la esprimo funkcias epitete kaj antaŭiras la substantivon, de kiu ĝi dependas.

La dua uzmaniero

En la dua uzmaniero **“tiel nomata”** kutime aperas **en la sinsekvo *tiel* + *nomata* + substantivo** kaj la adverbo *tiel* resendas al tiu ĉi posta substantivo, kiu havas la signifon de *etikedo*. Pli precize dirite, la esprimo **“tiel nomata”** funkcias kiel epiteto de la *etikedo.*

Per tiu uzmaniero, pli ol en la unua, **oni ofte atentigas, ke al tiu *etikedo* oni rilatas kun distanco** kaj intencas komuniki rezervon, dubon, kritikon, heziton, ironion k. s. aŭ nur atentigi pri ĝia konvencieco, kiel okazas interalie, kiam oni per tiu esprimo enkondukas fakecan vorton. Tian specifan atentigon ni nomas **sindistancigo**. Iafoje la sindistancigon plue emfazas uzo de citiloj ĉirkaŭ la prezentita *etikedo*.

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo.* Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Probal Dasgupta

“Mi akuzativas…!” diris Émile Zola

Probal Dasgupta (1953-2026) karieris pri la lingvistiko. Li laboris en 1980 kiel volontulo en la Centra Oficejo de UEA, de kiu li poste iĝis prezidanto (2007-13). Li iĝis membro de la Akademio de Esperanto ekde 1983 kaj ĝia prezidanto ekde 2016. Redakciano de “Beletra Almanako”, li aŭtoris en Esperanto multajn artikolojn kaj la libron “Loĝi en homaj lingvoj” (2011), kaj tradukis plurajn romanojn al kaj el Esperanto.

0. Kial tiu titolo?

Multaj aŭdis pri la nefermita letero de Émile Zola al la franca ŝtatestro Félix Faure. Titolita “J’accuse…!” (mi akuzas!), tiu protesto pri la diskriminaciego kontraŭ kapitano Alfred Dreyfus aperis en la taggazeto *L’Aurore* (la tagiĝo) en 1898. Leganto kiu ne konas la rakonton bonvole kleriĝu pri ĝi. “La afero Dreyfus” estis neignorebla en nia pionira epoko. Al ĝi ŝuldiĝis la fakto ke la demando de judeco iĝis sensacia en Francujo. Vide al tiu fakto, la organizantoj de la bulonja kongreso, informante la publikon pri Esperanto, zorge evitis mencii la judecon de Zamenhof (kutimo kiu ne tute malaperis).

Mia titolo kompreneble ironiumas. Zola estis franco. En lia lingvo, la substantivoj malhavas akuzativan finaĵon. Tial tipaj franclingvanoj, uzante Esperanton, ofte eraras pri la akuzativo. Nu, pluraj okcidenteŭropaj lingvoj – la nederlanda, la angla, la skandinavaj lingvoj – same malhavas akuzativan fleksion ĉe la substantivoj kaj same eraremigas siateritoriajn esperantistojn. Tial la priakuzativaj misoj estas ŝatata babiltemo. Tamen, ni kutime pensas ke la reguloj pri la uzo de la akuzativo – malsimile al tiuj por la refleksivo, ekzemple – estas simplaj, senmisteraj. Kial do artikoli pri la temo?

Tiu kutima penso ja akceptindas kiel bazo por elementaj kursoj. Sed progresintoj

bezonas iomete malpli bombonan dieton, laŭ mi. Gvidontoj kaj gvidantoj de superaj kursoj bonvolu pesi la ĉi-subajn cerbumaĵojn kaj poste verki pri la temo por sia publiko, almenaŭ pedagogiajn notojn, se ne seriozajn eseojn – eble en sia etna lingvo.

1. Du truoj en la pedagogia klarigo

Antaŭ ol tiri vin en mian salonon, ni komencu la konversacion en la kutima kafejo ŝatata de la pedagogoj. Oni instruas i.a. distingon inter la objekta (objekto-indika) akuzativo ekzemplata en *Manĝu fruktojn ĉiutage* kaj la direkta (direkto-indika) kiu aperas lige kun prepozicio en *Metu la ŝakpecojn en la skatolon* kaj kroĉe al adverbo en *Iru dekstren.* Neniu gramatika referencilo, tamen, kontentige ŝtopis du truojn en nia kompreno pri la direkta akuzativo.

La unuan truon vi trovos en la principa rilato inter adverboj kaj la direkta akuzativo. Ĉu la direkta akuzativo rajtas kroĉiĝi al *e*-finaĵa adverbo, punkto, fino? Se tiel estus, tiam eĉ la kvantaj adverboj *multe, kelke, malmulte* kapablus porti direktan N, kaj do eblus jenaj frazoj:

1. *Davido enmiksiĝis en multen da privataj kvereloj
2. *Davido enmiksiĝis en kelken da privataj kvereloj
3. *Davido enmiksiĝis en malmulten da privataj kvereloj

Sed, kiel la steletoj diras, tiuj frazoj estas malgramatikaj. Nur transiro al senadverbaj revortumoj solvas la problemon:

4. Davido enmiksiĝis en multajn privatajn kverelojn
5. Davido enmiksiĝis en kelkajn privatajn kverelojn
6. Davido enmiksiĝis en malmultajn privatajn kverelojn

Tio, tamen, estis nur la musa truo. Vi nun konatiĝos kun la dua truo, per kiu envenas ratoj. Konsideru la *om*-havajn tabelvortojn. Ili malakceptas akuzativan *n.* Sekvas, i.a., la maleblo diri 7 ĝis 9. Eĉ ne uzo de la torditaj formoj *kiomon* ktp savas tiujn frazprovojn el la erareco-puto:

7. *En kiomon da privataj kvereloj Davido enmiksiĝis?
8. *Davido enmiksiĝis en tiomon da privataj kvereloj
9. *Davido enmiksiĝis en neniomon da privataj kvereloj

Kaj mi, almenaŭ, ja ne havas ĉirkaŭvojon por esprimi la intencitan sencon per tiuj vortoj (mi flanken lasas perifrazojn kiel “kian nombron da”; esperantistoj kiuj akceptas *En kiom da kvereloj D enmiksiĝis?* parolas nete alian Esperanton ol mi; mi esperas legi iliajn memanalizojn). Malgraŭ la maltipeco de *da*, la gramatiko ne rajtigas vin maltipe ŝovi la *n*-finaĵon dekstren de tiu enigma elemento; tial 10 estas draste misa (bonvolu kompreni ke nur la spacoŝparemo igas nin preterlasi la misfrazojn kun *tiom* kaj *neniom*):

10. *En kiom da privatajn kverelojn Davido enmiksiĝis?

Eble vi estas lojala soldato de la pedagogia tradicio. Vi interalie malŝatas la

subitajn helikopterajn sintrudojn de lingvistoj kiuj proponas malortodoksajn laborilojn suplemente al via ordinara aparato. Tial vi preferas uzi sensuplemente la tradician aparaton kaj forgestas la truetojn, dirante, unue, ke en la praktiko ili ĝenas neniun, kaj due, ke por ŝtopi la t.n. truojn sufiĉas eksplicite diri ke nur spacindikaj adverboj rajtas porti direktan akuzativon.

Vin persone mi kompreneble lasos en paco. Ni estas pacama movado. Viaj kolegoj Ununjo kaj Duĉjo malfermis krompordon de via kursejo kaj flustre invitis min en la vestiblon. Tie okazas la ĉi-pluaj konversacioj. Dum mi interparolos kun tiuj mallojalaj kolegoj viaj, vi eventuale volos subaŭskulti. Aŭ vi atendos ĝis ili peros al vi ian diĝeston. Mi koncentriĝos pri la konversacio mem. Vian eventualan ĉeeston mi neniel rimarkos.

2. Reekzameni la musan kaj ratan truojn

Duĉjo: Mi pensas, Probal, ke via prezento maltrafis kelkajn faktojn. Almenaŭ **mia** lingvosento allasas *multen* en frazoj kie *multe* indikas punkton sur iu skalo aŭ spektro. Ekzemple, mi povas diri

11. La kurbo klare grimpas de malmulte multen, kara amiko!

Probal: Ĉu nur ĉe kvantaj adverboj vi trovas tiajn frazojn eblaj, Duĉjo?

Duĉjo: La plej simpla figura uzo kondukas al tiaj ebloj. Sed en beletro oni permesas al si pli drastajn metaforojn. En tia teksto mi pretus skribi ion kion mi verŝajne neniam dirus en konversacio:

12. Via detektivo estas brila. Oni rapide vojaĝas de mallumo lumen, de malklaro klaren!

Ununjo: Mi hezitus aprobi tiajn frazojn kiel redaktoro, krom se temus pri poezia licenco. Mi mem certe neniam parolus aŭ skribus tiel.

Duĉjo: La lingvosentoj ege varias, eĉ inter pedagogoj. Ĉu vi pensas pri la malfacileco instrui tiajn nuancojn, kaj pri la fakto ke multaj legantoj estas malpli ol B2-nivelaj? Se jes, mi konsentas kun viaj juĝoj.

Ununjo: Ne, mi parolas surbaze de mia naiva lingvosento. Mi nek produktus nek akceptus 12. Sed mi ja pretus diri *iri restoracien* aŭ *iri parizen*; se tiuj adverboj estus lokaj, tiam *loĝi parize* aŭ *atendi restoracie* estus normalaj, sed tiuj sonas poezie. Duĉjo, kiam vi do ekkonscios ke vi ofte virsplikas?

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Sabine Fiedler

Novaj esploroj pri konstruitaj lingvoj

Sabine Fiedler estas emerita profesoro pri lingvistiko en la Universitato de Leipzig (Germanio). Ŝi doktoriĝis en 1986 per disertacio pri angla faklingvo kaj habilitiĝis en 1999 en ĝenerala lingvistiko per studo pri la frazeologio en planlingvoj. Ekde 2011 ŝi estas la prezidanto de Gesellschaft für Interlinguistik e.V.

Ĝi estas recenzo pri la speciala numero de la reta revuo *RiCognizioni* Vol. 12 (23) 2025 kun la titolo “CrOCEVIA • *La créativité linguistique au prisme des langues construites / Linguistic Creativity Through the Lens of Constructed Languages.* Sous la direction de / Edited by Guillaume Enguehard, Philippe Planchon, Alice Ray”

Tiu ĉi kolektaĵo de artikoloj pri “lingva kreiveco tra la lenso de konstruitaj lingvoj” baziĝas sur prelegoj dum konferenco, kiu okazis en julio 2024 en Orléans organizita de la Laboratoire Ligérien de Linguistique. La kajero enhavas, aldone al la enkonduko de la redaktoroj, dek unu kontribuojn (ses skribitaj en la angla kaj kvin en la franca, ĉiu kun resumo en la angla).

Kreiveco en lingvoverkado estas la komuna deirpunkto de la verko, kiu okupiĝas kaj pri Esperanto kiel planlingvo uzata en reala interhoma komunikado kaj pri fikciaj lingvoj kreitaj por artaj celoj (kiel la Klingona aŭ la lingvoj de Meztero de Tolkien). Tiu ĉi recenzo provas doni superrigardon pri la verko, kvankam pro la granda nombro de kontribuoj ne ĉiu el tiuj povas esti diskutata detale. Laŭ mi, el interlingvistika vidpunkto, la artikolo de Federico Gobbo (“Constraints on the Art and Craft of Constructing Languages. Lessons Learnt from Classic Interlinguistics”, p. 19-31) ricevu la plej grandan atenton.

La distingon inter planlingvoj (laŭ Blanke [2018: 26] “konscie kreitaj lingvoj por faciligi la internacian komunikadon inter malsamlingvuloj”) kaj lingvoj konstruitaj por filmoj, beletraj verkoj, komputilaj ludoj kaj aliaj artaj celoj Gobbo klare malakceptas ĉe la difino de interlingvistiko. Li referas al la laboroj de Bausani (1970/1974), kiu

uzas kiel bazon la procezon de la kreado de lingvoprojekto kaj kovras ĉiujn tipojn de artefaritaj lingvoj, t. e. la klasikajn planlingvojn, slangojn de trompistoj kaj sekretajn lingvojn kreitajn de infanoj.

En 2017, en recenzo (*Language Problems and Language Planning* 41[3], p. 304), Gobbo skribis pri tri etapoj en la evoluo de interlingvistiko: la unua kun la studobjekto de la filozofaj lingvoj, la dua kun la ĉefa temo internaciaj helplingvoj kiel Esperanto kaj la tria, kiu komenciĝas per la ekesto de interreto kaj la studobjekto de la t. n. holivudaj lingvoj. Gobbo nun etendas ĉi tiun klasifikon en kvarfazan modelon. La antaŭklasika periodo, kiun karakterizas aprioraj projektoj (kiel tiu de John Wilkins), estas sekvata de la klasika periodo (1879-1951), dum kiu estis kreitaj la konataj planlingvaj modeloj (kiel Volapük, Esperanto, Ido, Occidental-Interlingve k. a.) karakterizitaj de eŭrocentrismo. En la centro de la tria periodo, la moderna interlingvistiko, staras Esperanto, la sola projekto, kiu sukcesis flegi sufiĉe grandan lingvan komunumon por plue disvolvi la lingvon kaj ĝian kulturon (“large enough to develop the language and its culture”, p. 27). La kvara periodo, kiun Gobbo nomas la postmoderna interlingvistiko, komenciĝis en la 1990-aj jaroj per la apero de la interreto. Ĝin karakterizas la kreado de projektoj kiel la Klingona, Na’vi, Dothraki kaj aliaj, kiuj estas pli ‘ekzotikaj’ laŭ naturo, kontraste al la bone konataj, eŭrocentraj internaciaj helplingvoj.

Gobbo enkondukas la terminon “awakening constructed languages” (vekiĝintaj konstruitaj lingvoj) por tiuj projektoj, kiuj trovas nur malmulte da subteno de grupoj de izolitaj aktivuloj (“tiny [<1000 users] from a bunch of isolated activists”) (p. 21). La termino verŝajne rememorigos la leganton pri “Semi-Plansprache” en la klasifiko de Blanke (1985) aŭ pri “(voll oder teilweise) verwirklichte Plansprachen” ([plene aŭ parte] realigitaj planlingvoj) ĉe Sakaguchi (1998: 277). Gobbo mencias Ido, Occidental/Interlingue, Interlingua kaj el la grupo de la lingvoj kreitaj por artaj celoj la Klingonan. Rilate al Dothraki kaj Altvaliria (High Valyrian) laŭ Gobbo ne sufiĉas datumoj por taksi la uzon.

Gobbo emfazas, ke la kreado de lingvaj projektoj estas submetita al pluraj limigoj. Tiuj inkluzivas la lingvan scion de la aŭtoro kaj lian/ŝian metalingvan komprenon. Se, ekzemple, la aŭtoro ne konas tonajn lingvojn, tiu trajto ne aperos en la projekto. Krome, la aŭtoro konservas influon super la strukturo de sia projekto nur tiel longe, kiel ĝi ne estas uzata kaj plue evoluigata de uzantoj. Fine, oni devas ankaŭ konsideri biologiajn limigojn, ĉar lingvo devas resti prononcebla kaj lernebla.

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Christopher Gledhill

Hazardaj kaj intencaj paronimoj: la rolo de paronimio en Esperanta vortfarado kaj terminologio

Christopher Gledhill estas profesoro pri angla lingvistiko ĉe Université Paris-Cité. Li instruas kaj esploras pri temoj rilataj al faktradukado, frazeologio, klara stilo, sistema funkcia analizo kaj, lastatempe, la semiotika analizo de ludoj. Li estas aŭtoro de libroj, artikoloj kaj tradukoj en kaj pri Esperanto. Li estas kun Klaus Schubert ĉefredaktoro de "Esperantologio / Esperanto Studies".
Paĝo en Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Christopher_Gledhill

Enkonduko

Se du sence kontrastaj vortoj havas preskaŭ identan parolan aŭ skriban formon, oni nomas ilin paronimoj. Ekzemple *efiko* kaj *eriko* estas "hazardaj" paronimoj, ĉar ili havas malsamajn originojn, formojn kaj signifojn ('rezulto' / 'arbusto'). Kontraste, *efiko* kaj *efekto* estas "intencaj" paronimoj, ĉar ili havas komunan leksikan originon (< *efficere*) kaj estas gramatike kaj signife similaj (ambaŭ estas substantivaj, unu signifas 'fenomeno, mensa impreso', la alia 'forta impreso'). Mi diras "intencaj", ĉar iam dum la disvolviĝo de la lingvo oni konscie decidis, ke Esperanto bezonas pli precizan nuancon ol havas ekzistanta vorto.

En ĉi tiu studo mi interesiĝas pri paronimio, ĉar ĝi ŝajne havas apartan rolon en la evoluo de la leksika inventaro de Esperanto. En la unua parto mi ekzamenas la lokon, kiun okupas paronimio en la lingva pejzaĝo de Esperanto. Poste, mi proponas tipologion de paronimoj kaj prezentas enketon pri ilia distribuo, precipe en PIV sen ankaŭ en fakvortaroj, kie la aŭtoroj ofte proponas paronimajn neologismojn. Fine, mi diskutas la rolon de paronimio kiel vortkonstrua strategio demandante, ĉu eblas konsideri ĝin kiel produktivan rimedon en esperanta vortfarado?

Iĝu abonanto de "La Ondo de Esperanto"!

1. Paronimoj en la lingva kulturo de Esperanto

Multaj lingvosciencaj studoj traktas la temojn de vortfarado kaj la konstruo de la leksika inventaro en Esperanto (Jansen 2013, Gobbo 2017, Planchon 2021). Tamen inter la konataj procedoj de vortofarado (adoptado, derivado, kunmetado, ktp.) la uzo de paronimio kiel aparta tekniko ne ofte estas menciata. Krom Kiselman (2011), kiu studas paronimion kiel postreston de pra-esperanta gramatiko, inter uzantoj de Esperanto paronimio estas plej ofte traktata kiel problemo por lernantoj (Wierzbowski 2017) aŭ peko kontraŭ la racia principo de “izomorfismo” (Samain 2010).

Esperantistoj konas paronimojn danke al la libro *Esperantonimoj* de Ĝivoje (1973). Tie li listigas pli ol 700 parojn da similaj vortoj. Simile, la libro *Konfuziloj* de Wierzbowski (2017) listigas pli ol 150 seriojn da paronimoj, ĉiuj akompanataj de difinoj kaj ilustraĵoj. Kvankam utilaj, tiuj studoj ne proponas sistemon de analizo aŭ tipologion. Kontraste, Melnikov (1989) faras sisteman revizion de paronimio, prezentante malsamajn tipojn de forma simileco inter paronimaj tipoj (laŭ akcentita silabo, komenca silabo, konsonantaj grupoj, ktp) same kiel tipologion de vortludoj kaj kalemburoj, kiuj utiligas paronimion (1989, 86). Interese, Melnikov vidas paronimion ne nur kiel alternadon de individuaj sonoj/simboloj en izolitaj vortoj, sed pli kiel la psikologian efikon de leksika simileco.

Kvankam paronimio ofte estas vidata kiel problemo (aldono de balastaj kaj konfuzigaj unuoj al la leksika inventaro), oni foje taksas ĝin pli pozitive. Wells (1978) adoptas tiun starpunkton, difinante paronimion kiel intencan strategion por eviti samformajn homonimojn:

> […] tre karakterize, la esperantistoj kutime evitas minacantan homonimecon per alpreno de paronimo, t.e. samdevena sed aliforma vorto […] (Wells 1978, p. 64).

En sia Franca-Esperanta vortaro, Waringhien (1957) substrekas la naturecon de la fenomeno rimarkante, ke historie paronimoj aŭ diverĝas (evoluante en apartajn signifojn) aŭ konverĝas (lasante unun preferatan radikon). Li citas la ekzemplon de kvar fruaj konkurencaj formoj por “subdivido de regimento”: *eskadrono* (L. Zamenhof, La Revizoro, 1907), *skadrono* (K. Bein, La Faraono, 1926) kaj *skadro* / *eskadro* (Plena Vortaro, 1934). Aktuale la Reta Vortaro registras la radikojn *eskadrono* kaj *skadrono* kiel arkaikismojn, dum ĝi agnoskas teknikan distingon inter la du “postvivantaj” vortoj *skadro* / *eskadro* (infanteria unuo / skadro de ŝipoj, aviadiloj).

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Ilona Koutny

Loko kaj enhavo de esperantologio fone de interlingvistiko

Ilona Koutny, emerita profesoro pri lingvistiko (hungararologio kaj esperantologio) en Adam-Mickiewicz-Universitato, Poznano (Pollando). Iama disĉiplo de István Szerdahelyi kaj lia posteulo en la Esperanto-fako de ELTE (1987-95), Budapeŝto (Hungario). Fondinto kaj gvidinto de la Interlingvistikaj Studoj en AMU (1998-2024). Ŝi esploras la rilaton inter lingvo kaj kulturo, interkulturan komunikadon, esperantan lingvistikon, pragmatikon kaj leksikografion. Ŝi publikigis kelkajn librojn, vortarojn kaj multajn artikolojn en diversaj lingvoj.

Tradicie esperantologio estas parto de interlingvistiko kiu siavice apartenas al lingvistiko. Lastatempe aperas opinio ke ĝi estas jam sendependa de interlingvistiko (Lindstedt 2024). Alia diskuto rilatas al la enhavo de esperantologio, ĉu ĝustas ĝin konsideri kiel lingvistikan branĉon, ja ĝi esploras ankaŭ esperantajn literaturon kaj movadon. En la sekvoj tiuj demandoj estos traktataj.

1. Interlingvistiko en nuksoŝelo

La terminon *interlingvistiko* uzis unue Meysmans en 1911, sed la konata lingvisto Otto Jespersen enkondukis ĝin en sia artikolo en 1931: *A New Science: Interlinguistics.* Li mem unue estis adepto de Esperanto, sed poste kreis sian planlingvon Novial (1928). Tio estis periodo de krea interlingvistiko kun celo esplori la strukturon de ekzistantaj lingvoj por establi normojn por internacia lingvo. Pro tio ekestis IALA (International Auxiliary Language Association ‘Internacia Helplingva Asocio’, 1924-53) al kiu aliĝis konataj lingvistoj (Jespersen, Sapir, Swadesh, Collinson, Martinet). Post la dua mondmilito, fine Gode (tiama direktoro) prezentis sian propran planlingvon Interlingua (1951) kiu baziĝis ĉefe sur latinidaj lingvoj.

La historio de artefaritaj lingvoj, alie *planlingvoj* (prefere uzata far interlingvistoj post la enkonduko de la termino “Plansprache” far Wüster kiu nuntempe estas kon-

siderata kiel patro de terminologio), reiras ĝis la monaĥino Hildegard von Bingen (13a jc.) kiu kreis sian sekretan lingvon. Tiu kategorio entenas la *filozofiajn lingvojn* en la 17-18a jc. kiujn iliaj aŭtoroj konstruis sur iu supozita logika bazo. Leibniz kredis ke la pli kompleksaj nocioj, vortoj kreeblas el la pli simplaj, simile al konstruo de kunmetitaj nombroj el simplaj kio signifus ke eblus krei novajn nociojn.

La teknika evoluo en la 19a jc. (apero de vaporlokomotivo, telegramo ktp. kiuj ebligis la komunikadon inter diverslingvaj landoj) kunportis la bezonon de komuna lingvo, tiel ekestis la *internaciaj helplingvoj* kiel Volapük kaj Esperanto. En la dua parto de la 20a jc. interlingvistoj okupiĝis ĉefe pri la prezento kaj komparo de planlingvoj (Szerdahelyi 1979 en 2024, Blanke 1985 ktp.).

Novan epokon kunportis la disvastiĝo de la reto. La lingvokreo iĝis hobio kaj la rezulton eblis publikigi en la reto. Nuntempe jam ekzistas plurcent t. n. *konstruitaj lingvoj* (*conlangs*) en diversaj etapoj de ellaboriteco kaj eĉ iloj por lingvokonstruo (Language Construction Kit). Cetere, lingvokonstruado estas utila por konsciiĝi pri la lingvaj kategorioj kaj strukturoj.

Věra Barandovská-Frank (2020) priskribas la plej gravajn planlingvojn kaj iliajn klasifikojn. Malgraŭ la multeco de planlingvoj lingvistoj malofte okupiĝas pri interlingvistiko, kelkfoje ili neglektas ilin, havas eĉ negativan aliron al planlingvoj. La multflanka *Internacia Kongreso de Lingvistoj* (IKL) kiu okazas ĉiun kvinan jaron en diversaj landoj, malofte enkadrigas tiun ĉi terenon: (1) dum la dua kongreso (1931) lingvistoj diskutis la eblon de internacia helplingvo; (2) dum la 6a kongreso André Martinet levis la problemon de artefarita lingvo; (3) dum la 15a IKL en Berlino Detlev Blanke organizis rondtablan diskuton pri planlingvoj kaj (4) dum la 21a en Poznano Ilona Koutny kun Nicolau Dols okazigis interlingvistikan sekcion kun 12 kontribuantoj (surbaze de tiuj kaj aliaj studoj aperos anglalingva libro).

Kio estas do, interlingvistiko? Blanke (ankaŭ en 2018) difinas ĝin kiel branĉon de lingvistiko kiu esploras ĉiujn aspektojn de planlingvoj kaj rilatajn temojn en internacia komunikado, konsiderante lingvistikajn, socilingvistikajn kaj historiajn perspektivojn, speciale ĝi okupiĝas pri la optimumigo de komunikado perhelpe de planlingvoj kiel Esperanto. Li donas ankaŭ kriteriojn por planlingvoj ekde strukturo ĝis kulturo kaj evoluo (vd la 28 kriteriojn ankaŭ en Fiedler aperonta). Ĉiujn kriteriojn plenumas nur Esperanto. Fakte, tiuj kriterioj validas kaj necesas ankaŭ por vivantaj etnaj lingvoj.

Planlingvoj povas esti zonaj helplingvoj kiel Interslavic, eksperimentaj lingvoj kiel Toki Pona aŭ logikaj lingvoj kiel Lojban.

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Marc van Oostendorp

Eviti rimon en Esperanta prozo



(Foto: Saskia Aukema)

Marc van Oostendorp (1967-) doktoriĝis pri lingvistiko ĉe la Universitato de Tilburg. Li estis la unua eksterordinara profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo (1997-2001), poste profesoro pri fonologia mikrovariado en Leiden (2007-2017), kaj de 1999 ĝis 2025 ankaŭ altranga esploristo ĉe la Meertens-Instituto (Reĝa Nederlanda Akademio de Sciencoj). Ekde 2017 li estas profesoro pri lingvistiko ĉe la Radboud-Universitato en Nimego, ĉefredaktoro de la nederlandlingva revuo "Neerlandistiek" kaj redaktoro de "Journal of Linguistics" (Cambridge). Li estas membro de la Reĝa Holanda Societo de Sciencoj, de la Akademio de Esperanto. Esplorterenoj: fonologio, morfologio, dialektologio, lingva variado kaj interlingvistiko. Li publikigas en pluraj lingvoj, interalie, historion de Esperanto "Een wereldtaal" (Tutmonda lingvo, 2004).

Kial verkistoj evitas rimon, kvankam neniu tion malpermesis?

Zamenhof proponis 16 regulojn por Esperanto, sed "ne metu du rimajn vortojn unu apud la alia en via prozo" ne estas inter ili. Ĝi ne estas en postaj gramatikoj, ĝi ne estas instruata en kursoj, kaj se vi demandus al spertaj verkistoj, ĉu ili konscie evitas tian rimon, la plimulto respondus, ke ili neniam pri tio pensis. Kaj tamen, kiam oni mezuras grandan amason da tekstoj, montriĝas io stranga: la verkistoj *ja* evitas ĝin en Esperanto, kiel en aliaj lingvoj.

Temas pri regulo, kiun neniu skribis kaj tamen preskaŭ ĉiuj sekvas. Kiel oni povas vidi tian nevideblan normon? Kio ĝi precize estas, kaj kial Esperanto estas interesa lingvo por testi ĝin.

Kio estas "evito de rimo"?

Por kompreni kion mi faris por pristudi ĉi tiun demandon, imagu la jenon. Prenu multajn paĝojn da prozo kaj rigardu la vortojn, kiuj staras proksime unu de la alia,

ene de spaco de kelkaj vortoj. Kalkulu, kiom da tiaj najbaraj paroj rimas. “Rimi” ĉi tie signifas, ke ili kongruas en la lasta akcentita silabo: *sento* kaj *vento*, *koro* kaj *doloro.*

Nun faru la saman kalkulon sur “hazardigita” versio de la *sama* teksto: la samaj vortoj, sed perkomputile miksitaj en alian ordon. Tiu miksita teksto montras, kiom da najbaraj rimoj aperus, se la verkisto tute ne zorgus pri ili – la pura hazardo. Se la *reala* teksto havas malpli da najbaraj rimoj ol la miksita, tiam la verkisto, konscie aŭ ne, forpuŝis rimajn vortojn unu de la alia. Tio estas evito de rimo.

Unu averto necesas, ĉar ĝi gravas por la honesteco de la mezuro. Estas diferenco inter *vera* rimo – kie du malsamaj vortoj kongruas en la fino, kiel *sento* kaj *vento* – kaj nura ripeto de la sama vorto aŭ de ĝiaj formoj, kiel *libro* kaj *libroj*. La dua ne estas vera rimo; ĝi estas simple ripeto. Honesta mezuro nombras nur la veran rimon kaj forĵetas la ripetojn.

La normo ekzistas – kaj ne nur en unu lingvo

Jen la ĉefa trovaĵo. Kiam mi aplikis tiun mezuron kun komputilo al granda kvanto da prozo, la evito aperis en ĉiuj lingvoj kiujn mi pristudis ĝis nun: en la nederlanda, la germana, la franca, la angla, la itala kaj la japana. Ses lingvoj kun tute malsamaj sonsistemoj kaj poeziaj tradicioj – kaj en ĉiuj la verkistoj metas rimajn vortojn pli malproksimen unu de la alia ol hazardo dirus.

Esperanto aliĝas al la familio. En la *Tekstaro de Esperanto* – la granda reta kolekto de Esperantaj tekstoj – la sama evito estas klare mezurebla. La lingvo, kiun unu homo planis de la unua finaĵo ĝis la lasta, kondutas same kiel la naturaj lingvoj, kvankam neniu enkonstruis tian regulon.

Tio estas pli surpriza ol ĝi unuavide ŝajnas, pro io aparta pri Esperanto, al kio mi baldaŭ revenos.

Ne ĉiu genro obeas egale

La normo ne estas same forta ĉie. Ĝi varias laŭ la speco de teksto, kaj ĝuste tiu variado helpas konvinki, ke temas pri vera lingva normo kaj ne pri statistika hazardo. La grafiko (vd. p. 56) montras la gradienton tra pluraj Esperantaj genroj.

Plej forte evitas la *moderna literatura prozo* kaj la *bibliotradukoj* – ĝuste la tekstoj, kie oni plej zorgas pri la sono de la frazo. La gazetaro kaj la romanoj sekvas.

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Ryszard Rokicki

Rimarkoj pri interpretoj de la Fundamento

Ryszard Rokicki (1949-) diplomiĝis (1972) kaj magistriĝis pri aplika lingvistiko (1975) en la Fremdlingva Fakultato de la Varsovia Universitato, laboris kiel lingvoinstruisto en lernejoj kaj kiel abiturienta ŝtata ekzamenisto, verkis plurajn lernilojn. Li kompilis kaj redaktis tri volumojn de "Acta Interlinguistica", redaktis kaj eldonis 21 kajerojn de "Informilo por Interlingvistoj" (1983-90) kaj organizis Esperantologian Konferencon dum la jubilea Universala Kongreso en Varsovio (1987). Lia ĉefa interesiĝobjekto estas lingvistikaj aspektoj de la fenomeno Esperanto kaj apliko de lingvistikaj metodoj por priskribi ĝin. Rokicki verkis plurajn artikolojn kaj la libron "Enkonduko en la morfologion de Esperanto" (2022).

Enkonduke

Interpreto de la Zamenhofa priskribo de la morfologia sistemo de Esperanto daŭre restas temo diskutinda, malgraŭ ke ĝi impresas jam priskribita kiel regula, travidebla kaj interne kohera. La Gramatiko de Zamenhof allasas certa-gradan liberecon en sia interpreto – ĝiaj reguloj estas relative subdeterminitaj. Sekve, lingvouzantioj evoluigas ĝia-baze la lingvon uzante ankaŭ siajn intuiciajn etnolingvajn scion kaj sperton.

Bazaj leksikaj unuoj

Unu el la ĉefaj demandoj de Esperanta vortformado koncernas la bazajn leksikajn unojn: ĉu ili estas radikoj aŭ vortoj. La radik-bazita modelo konsideras radikojn kiel bazajn leksikajn unuojn, ekz.: *bel* + *a* → *bela*, *lern* + *ej* + *o* → *lernejo.* Tiu sistemo estas videbla ankaŭ en la Universala Vortaro, kie radikoj estas prezentitaj nudaj. En sia vortaro Esperanto-pola kaj pola-Esperanto, Zamenhof klarigas aparte la signifon de nudaj radikoj, afiksoj kaj finaĵoj en la pola kaj tradukante el la pola

en Esperanton, li ankaŭ uzis nudajn radikojn. Ekz.: *abel'* – *pszczoła* kaj inverse: *pszczoła* – *abel'*. Tiu maniero prezenti la leksikajn unuojn videbligas gravecon, atribuatan de Zamenhof al klara distingo inter lingveroj leksikaj – radikoj, lingveroj modifantaj la radikan semantikon – afiksoj kaj lingveroj informantaj pri plenumata frazrolo – finaĵoj, kio konformas al lingvistaj prezentomanieroj.

Rezigno pri tradukado de nudaj lingveroj, kvankam konvena por didaktikaj celoj, nebuligas iom la vortstrukturon konceptitan de Zamenhof kaj perceptatan de lingvouzantoj. Mikso de funkcidiferenco inter la nete semantikaj unuoj (radikoj kaj afiksoj) kaj leksikaj (plenaj radik/al/vortoj kun sintaksaj markiloj) rimarkinde influis la priskribon kaj interpreton de la vortfara sistemo de Esperanto, kio estas ja bazo por sukcesa funkciado de la lingvo. Pri tiu fenomeno okupiĝas gramatikistoj.

La vortbazita modelo konsideras plenajn vortojn bazaj leksikaj unuoj, de kiuj estas derivitaj aliaj formoj: *bela* → *bele*, *lerni* → *lernejo.* Ĝi estas taŭge aplikata por lingvodidaktikaj celoj, faciligantaj la lernadon de la lingvo. Multaj lernantoj pensante per jam ekzistantaj vortoj, perceptas derivaĵojn kiel transformojn de plenaj vortoj kaj ne nepre kiel kunmetojn de radiko kun alkroĉitaj afikso kaj finaĵo. Vortoj kiel leksikaj (ankaŭ psikologiaj) unuoj estas fenomeno ĉefe lingvouza kaj devas esti analizata ankaŭ kiel tia.

Kutime vortaristoj prezentas en vortaroj plenajn vortojn kun markiloj pri ilia baza, sintakse primara frazfunkcio. Do, en singulara nominativo (substantivoj kaj adjektivoj), aŭ en infinitivo (verboj), de kiuj poste deriviĝas vortformoj modifitaj, ĉu sintakse (kun ŝanĝo de frazfunkcio), ĉu semantike aŭ ambaŭ.

Esperantaj leksikografoj ne sekvas la ekzemplon donitan de Zamenhof kaj rezignis pri traduko de nudaj radikoj, konformigante tiel Esperantajn vort-registrojn al ĝeneraj leksikografiaj kutimoj. Aŭtoroj de Esperanto-Esperantaj vortaroj provas trovi kompromison inter la adeptoj de radik- kaj vortbazita derivadoj. Ekz. PIV, kiu prezentas finaĵplenajn vortformojn tamen dividitajn per oblikva streketo.

Ambaŭ perspektivoj (vort- kaj radik-bazita) rigardi la vortformadon havas siajn adeptojn kaj trovas aplikon en malsamcelaj (lingvistikaj kaj pordidaktikaj) lingvopriskriboj, tio signifas, ke ambaŭ teorioj plenumas sukcese kognajn bezonojn de lingvokonsciaj kaj analizemaj lingvouzantaroj.

Semantika prototipeco de radikoj

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo.* Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Klaus Schubert

Hugo Schuchardt, frua interlingvisto

Klaus Schubert (1954-) estas emerita profesoro pri aplika lingvistiko en la Universitato de Hildesheim (Germanio). Li publikigis studojn pri aro da interlingvistikaj temoj. Li aktivas kiel estrarano de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) de UEA kaj kiel kunredaktoro de la revuo "Esperantologio / Esperanto Studies".

Lingvistiko en la 19-a jarcento

En 2026 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en Graco (Aŭstrio). Tio kondukas la penson al la fama graca profesoro Hugo Schuchardt kaj lia rolo en la frua akademia debato pri lingvokonstruado kaj planlingvoj.

La unuaj planlingvoj funkciantaj en reala komunikado estis Volapuko ekde 1879 kaj Esperanto ekde 1887. Jam antaŭ tio dum pluraj jarcentoj kleruloj skizis aŭ eĉ foje ellaboris lingvosistemojn, kutime nomatajn universalaj lingvoj. Tiuj sistemoj tamen neniam estis uzataj en reala komunikado kaj la plej multaj eĉ ne estis destinitaj al tia uzo, sed al sistemigo de la konceptoj kaj propozicioj de la homa pensado. En la 19-a jarcento ene de la nova fako lingvistiko oni multe debatis pri la origino, la evoluo kaj la esenco de la homa lingvo. Pluraj influhavaj profesoroj disvastigis tezon hereditan el la 18-a jarcento, ke la homa lingvo evoluas kiel vivanta organismo. Kaj kelkaj eĉ pli aŭdace verdiktis, ke ĝi fakte estas vivanta organismo. Tiun organismoteorion en la 1860-aj jaroj plej rigore predikis August Schleicher [1821–1868], profesoro en Jena. Liaj teorioj grave influis la tiel nomatajn jungramatikistojn, skolon de specialistoj pri hindeŭropa, ĝermana kaj slava lingvohistorio. Tiu profesoraro aktivis ekde proksimume 1875 en la Universitato de Lepsiko, kaj iliaj studintoj kaj doktoriĝintoj iom post iom okupis universitatajn postenojn dise en Eŭropo. Deklarante la lingvon natura fenomeno, la jungramatikistoj strebis por sia fako akiri statuson same prestiĝan, kian ĝuas la natursciencoj. En sia studo de la historia evoluo de

lingvoj ili trovis regulajn ŝanĝiĝojn de la parolsonoj kaj, por egali al la leĝoj de la natursciencoj, nomis tiujn sonleĝoj, asertante ke de ili ne ekzistas esceptoj. Rilate al konstruitaj lingvoj la organismo-teorio precipe implicis, ke ne eblas krei lingvon, samkiel ne eblas krei rozon aŭ najtingalon, kiel belvortis Schleicher.

Hugo Schuchardt

Hugo Schuchardt

En tiu scienca etoso eniris la universitatan medion Hugo Schuchardt. Li naskiĝis en 1842 en Gotha, studis ĉe Schleicher en Jena, doktoriĝis en Bonn, habilitiĝis en Lepsiko kaj en 1876 fariĝis profesoro pri latinidaj lingvoj en Graco. Li emeritiĝis jam en 1900 kaj forpasis en 1927.

La homon Hugo Schuchardt oni priskribas kiel ekscentran, kaprican kaj ankaŭ hipoĥondran. Laŭdire li malŝatis lekcii kaj preferis okazigi siajn seminariojn en privata sfero. Kiel lingvisto Schuchardt havis tre vastan kaj multfacetan intereso-sferon. Li ŝatis esplori la lingvojn surloke, inter la simplaj samkiel inter la bonhavaj homoj, en vilaĝaj festoj samkiel en aristokrataj baloj. En lia epoko, lia konduto estis skandale neprofesoreca, sed nuntempaj historiistoj de la lingvistiko fakte trovas lian sciencan argumentadon kohera kaj persista. Schuchardt realigis ampleksan lingvistikan esploradon kaj verkis abunde. La omaĝlibro okaze de lia 80-jariĝo listigas 842 liajn publikaĵojn kaj la hodiaŭa interreta Schuchardt-arkivo de la Universitato de Graco enhavas eĉ pli. Schuchardt esploris la latinidajn lingvojn, precipe la malgrandajn kaj la dialektojn, sed li vagis ankaŭ al en lia fako pli nekutimaj lingvoj kiel la hungara, la kimra, la eŭska aŭ la kartvela. Schuchardt laboris pri lingvohistorio, precipe pri la evolua ŝanĝiĝo de la sonoj kaj pri etimologio, sed ankaŭ pri la origino de la homa lingvo kaj de la lingvoj, la parenceco de lingvoj kaj ilia miksiĝo. Schuchardt plej frue inter la renomaj lingvistoj de sia tempo serioze esploris la miksiĝon de lingvoj, el kiu estiĝis la piĝinaj kaj kreolaj lingvoj. Interalie li studis la iaman mediteranean lingvafrankaon – kaj kiam aperis la nova lingva fenomeno de funkciantaj planlingvoj, li kun malferma menso interesiĝis ankaŭ pri ili.

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Interlingvistiko kaj esperantologio en “La Ondo de Esperanto”

En la suba listo estas notitaj ĉiuj interlingvistikaj kaj esperantologiaj studoj kaj artikoloj, aperintaj en “La Ondo de Esperanto”, inkluzive de recenzoj kaj intervjuoj, en kiuj estas traktataj interlingvistikaj kaj esperantologiaj problemoj.

Akademio de Esperanto

Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (2007: №6, №7, №10, №12; 2008: №1, №3, №5)

Rekomendo de la Akademio de Esperanto pri la uzo de propraj nomoj (2013: №11)

Pri ne-oficialaj seks-neŭtralaj pronomoj (2021: №1)

Pri vortordo en Esperanto: Raporto de la Gramatika Sekcio de la Akademio de Esperanto (2021: №3)

Deklaro de la Akademio de Esperanto pri la Esperanta litero *ŭ* (2023: №2)

Pri la stataj adjektivoj derivitaj de statŝanĝaj verboj kaj pri la signifokategorio de *koruptI* (2025: №1)

Aŭtoraj verkoj

Banaitis V. Responde al profesoro Mattos (2006: №6)

Banaitis V. Manipulebla gramatiko (2007: №1)

Barandovská-Frank V. Tutmondiĝo de portugalaj kulturo kaj lingvo: Kien nun, kreoloj? (2018: №3)

Barandovská-Frank V. Komencoj de la lingvokonstruado en Eŭropo: Hildegard de Bingen kaj Athanasius Kircher (2019: №3)

Barandovská-Frank V. IALA kaj Interlingua (2019: №10, №11)

Barandovská-Frank V. Pri “lingua franca” (2020: №4)

Barandovská-Frank V. Ĉu novas Lingua Franca Nova? (2021: №2)

Bavant M. La landnomoj en Esperanto kaj la diskuto ĉirkaŭ la naturo de “sufikso” -i (2008: №3)

Bavant M. Denove pri akcento en kunmetitaj vortoj (2010: №2)

Bishop B. Schleyer kaj ties emocioj pri Esperanto (2012: №8-9)

Bishop B. Volapuko havas novan Cifal! (2014: №6)

Blanke D. Interlingvistiko kaj esperantologio, ĉu vere necesaj? (2006: №4–5)

Blanke D. Pri la termino “planlingvo” (2006: №6)

Blanke D. Kio estas GIL (2014: №4–5)

Borsboom E. La origino de la vorto “vosto” (2013: №8-9)

Brosch K. “Mesaĝon aŭdas mi, sed mankas al mi kredo” [Recenzo: Rokicki R. Enkonduko en la morfologion de Esperanto] (2023: №1)

Brosch K. Pri la signifo de “temi” (2025: №3)
Brosch K. Lingva Konsultejo: Sintezaj kunmetitaj verboformoj (2025: №4)
Brosch K. Lingva Konsultejo: Metafora uzo de “ŝlosila” (2026: №1)
Bujdosó I. Parencaj lingvoj (2008: №4)
Corsetti R. Ĉu Corsetti aŭ Korseti? (2008: №7)
Dasgupta P. Postulati vortilojn sen vorteroj (2005: №6)
Dasgupta P. Abunda torento [Recenzo: Interlingvistiko kaj Esperantologio: Bibliografio de la publikaĵoj de Detlev Blanke] (2015: №4-5)
Derks J. Kio estas pli patriota, -io aŭ -ujo? (2017: №5)
Duc Goninaz M. Kiel la anĝela *po* povas helpi vin por ricevi dolarojn, manĝi pomojn kaj eble ĉesigi la fumadon (2007: №6)
Duc Goninaz M. Manĝi marmeladon sur fotelo ne estas facile, aŭ: pri kelkaj problemoj de semantika strukturado (2008: №12)
Duc Goninaz M. Kelkaj rimarkoj pri la t. n. “akuzativo” (2016: №3, №4-5)
Duličenko A. Paroli la komunan lingvon, por esti komprenata de ĉiuj (2007: №6)
Fiedler S. Interlingvistiko kaj esperantologio: kelkaj spertoj el Germanio (2019: №3)
Fischer-Kotowski P. Kalocsay kaj Waringhien ne hontus pri siaj posteuloj: Intervjuo kun P. Dasgupta (2019: №3)
Fischer-Kotowski P. Entombiga numero de *Esperantologio* [Recenzo: Esperantologio / Esperanto Studies, №8] (2019: №3)
Golden B. Proverboj en Esperanto: hodiaŭ kaj morgaŭ (1995: №3-4)
Golden B. Kial Zamenhof elektis “kurba”? (1996: №1)
Golden B. Pri tiel nomata rusisma vortordo (1996: №4-5)
Golden B. La estetika principo en planlingvistiko (1997: №1)
Gorecka H. Omo, la lingvo de homo (2010: №12)
Gorecka H. Planlingvistikaj konferencoj en Uralo (2019: №3)
Grimley Evans E. Parencoj (2019: №8-9)
Haupenthal R. Iom pri kiĉo (2007: №7)
Haupenthal R. Oficialaj Aldonoj — la vivanta lingvo fajfas pri tio (2007: 7)
Haupenthal R. La dika raporto de Couturat (2007: №11)
Haupenthal R. Aliaj landoj, aliaj brandoj (2008: №4)
Haupenthal R. Planlingva praulo kaj lia programo. La elpaŝo de August Theodor von Grimm (1804-1878) (2010: №1)
Haupenthal R. Vigla Schleyer-resonado (2012: №8-9)

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Eventoj

En ĉi tiu eldono de “La Ondo” vi povas legi artikolojn pri multaj lokaj kaj internaciaj esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj okazintaj en Esperantujo dum aprilo, majo kaj junio. Unu el la plej fruaj el ili estis la Internacia Junulara Festivalo, okazinta la 1-7an de aprilo en Ĉervjo **(vd. p. 90).**

Jubilea Brita Kongreso: 50 jaroj da EAB

Duoncentjariĝis Esperanto-Asocio de Britio en 2026. Ĉu surprize? Sendube. Mi klarigu: Esperanto jam troviĝis en la periodo pionira, kaj la Brita Esperantista Asocio fondiĝis en 1904. Ne temas, do, pri la alveno de Esperanto ĉi tie. Simple estas tiel, ke dum ĉirkaŭ du jardekoj ekzistis paralele du asocioj, ĝis EAB, fondita kiel bonfara asocio en 1976, transprenis la membrojn kaj nemoveblaĵojn de la veterana BEA, privata firmao. La heredaĵo, do, etendiĝas multe pli longe en la pasintecon.

Membroj de EAB jam ricevis en la februara fondotago gazeton “Kvindek”, en kiu troviĝas historio pri la estigo de la nova asocio, klarigante la kialon kaj kielon. Duaparte legeblis la Unua Libro, tradukita en la anglan de Richard Geoghegan en 1889.

La dua maniero festi la jubileon estis per pli ampleksa Brita Kongreso. Tio okazis en Lestero (Leicester) en la mezo de Anglio. Aldone al la kutimaĵoj estis luado de teatro por vespera programo, pli da invititoj, kaj dutaga postkongresa programo.

Kvizoj por komenci

Vendrede, la 24an de aprilo, kunvenis la plimulto da aliĝintoj en Teatro Y por la unua vespero. La venkinta teamo en la leĝera kvizo “Poentoj = Pundoj”, gvidita de Tim Owen, gajnis 500 eŭrojn por Konto Espero de UEA, kiu disdonas po 100 eŭrojn al esperantistoj en DR Kongo. Sekvis donace de EAB ŝaŭmvino kaj bufedo laŭ barata stilo; pli ol triono de la loĝantoj de Lestero estas barat-devenaj. Finis la vesperan programon Maurizio Giacometto per sia teama “Slaloma Konkurso”, rezulte de kio pliaj 100 eŭroj aldoniĝis al Konto Espero.

La jubilea kongreso formale malfermiĝis sekvamatene, en la urbocentra konferencejo St Martins House Conference Centre, najbare al la katedralo. La ĉefa invitito Jouko Lindstedt prelegis dufoje: pri “Tove Jansson kaj la muminlibroj en sia historia kunteksto”, kaj pri temo lingvo-rilata “La kaŝita unueco de Balkanio”. Novuloj ĝuis tri sesiojn kun Elizabeth Stanley: laŭ la programo devis okazi du, sed ŝi kaj ili tiel ĝuis la sperton, ke ili spontanee decidis plenigi truon en la programo per plia.

Prelego, ateliero, ludoj kaj muziko

Alia kontribuinto estis regula invitito Stela Besenyei-Merger. Ŝi prelegis matene pri fama aŭtoro, Sue Townsend, kiu estis lesterano. Kial aparte Stela, hungaro? Ĉar ŝi enamiĝis al la libroj kaj ilia verkinto en sia junaĝo. Posttagmeze ŝi gvidis legosalonon pri “Blanka Kanino”, aperigota libro verkita de Jack London kaj tradukita de Klivo Lendon. Kuniĝis kun ŝi Claire Divoy fine de la taga programero por gvidi atelieron pri privilegioj. En la kromaj ĉambroj samtempe okazis sesioj por tabelludantoj kaj muzikemuloj, gvidataj respektive de Roberto Garcia kaj Jack Warren.

Post 90-minuta paŭzo por vespermanĝi, oni kunvenis plian fojon ĉe Teatro Y por la vespera programo. Ĝi ekis per fulmprelegoj; prezentoj (teorie) kvin-minutaj pri temoj elektitaj de la prelegantoj. Tiamaniere, ĉiuj povas kontribui al la aranĝo,

aparte se pli longa kaj formala prezento ne eblas. Por profiti de la ejo, sekvis du teatraĵoj: “Provludo en la klubo” estas amuza skeĉo trovebla en la novelaro “Okuloj” de Marjorie Boulton; la dua estis “Oni diris al mi”, plurvoĉa “monologo” pri la mitoj kaj la realeco de internacia komunikado, pensiga teksto de Claude Piron pri la bezono de internacia lingvo kiel Esperanto. La tago finiĝis per elstara koncerto de pliaj invititoj: la muzik-duopo Ĵomart kaj Nataŝa. Ili eĉ debutigis kanzonon tute nove verkitan pri numtempaĵoj kaj montriĝis la veraj steluloj de la Brita Kongreso.

Posttagmezo programer-plena

Dimanĉo komenciĝis per jarkunveno de EAB. Oni tamen ne forgesis la ne-membrojn; sesiojn por ili gvidis unue Pauli Kozuchova (Lingvaj portrejoj) kaj, due, Stela Besenyei-Merger (legosalono pri Kálmán Kalocsay). La lunĉpaŭzo sekvigis litanion de programeroj. Post reveno en la kongresejon, Gabriel Beecham, prezidanto de EAB, distris per: “Kiam vortoj ne sufiĉas: komunikado en medicinaj urĝaĵoj”. Estrarano John Greenwood prezentis “Carl Rogers: fondinto de personkerna terapio” samtempe, kiam Jouko Lindstedt diskutigis la temon “Niĉoj por Esperanto” kaj Stela Besenyei-Merger starigis trian legosalonon, ĉi-foje pri tradukata libro “La Murdo en la paroĥestrejo”, verkita de Agatha Christie.

Ĝia tradukanto, Clare Hunter, tuj poste prezentis sesion “Tradukaj tiklaĵoj” pri la defioj, kiujn ŝi alfrontas. En la ĉefa ĉambro Tim Owen prelegis kun la jubileo en la menso: “Antaŭ EAB: la ekfloro de Esperanto en Britio”. Fermiĝis la Brita Kongreso per anonco, ke ĝi ne revenos sekvajare: EAB – kaj esperinde aliaj asocioj – partneriĝos kun Espéranto-France por okazigi Eŭropan Kongreson apud Marsejlo.

Koncertas ĴomArt kaj Nataŝa

Batalkampo kaj kulturaĵoj

Finiĝis la formalaĵoj, tamen restis frandaĵoj en la menukarto. Tio komenciĝis post paŭzo per grupa manĝo en barata restoracio Tamatanga, kaj daŭris sekvamatene per ĉeestado en la Vizitcentro Rikardo la Tria: temas pri la lasta angla reĝo mortigita en batalo. Lia morto signifis falon de la dinastio, kaj lian kadavron oni trovis en Lestero pli ol kvincent jarojn poste. Posttagmeze oni ekskursis per buso al la batalkampo Bosworth, ĝuste kie okazis tiu grava konflikto. Tie ĉiĉerono vivigis la okazintaĵojn, kiel same faris poste la tiea vizitcentro. Post reveno en Lestero okazis plia grupmanĝo, ĉi-okaze en restoracio itala.

En mardo, la dua ekskursa tago, la surprizan sunbriladon, kiun ni neatendite ĝuis ĝis tiam, anstataŭis pli kutimaj pluvgutoj: oni ja parolas pri la “aprilaj pluvetadoj” ĉi tie. Tio ne malhelpis marŝi dum kelkaj minutoj por atingi muzeon pri romi-epoka Lestero – tute hazarde malfermitan post renovigo la 26an de julio pasintjare – sed levis la demandon, ĉu estos plezuraj la planataj posttagmezaj ekskursoj al du parkoj. Tial la planoj ŝanĝiĝis surloke, kaj oni anstataŭe vizitis la artmuzeon de Lestero, kiu troviĝas nelonge for de la stacidomo, kaj ne postulas monon por eniri. Ankoraŭ pli alloge: malgraŭ la nomo, ĝi enhavas skeleton de giganta dinosaŭro!

Postkongresaj pensoj

Ĉiuj surloke ŝajnis ĝui. Pluraj sendis mesaĝon por tion rekte diri, inkluzive de niaj invititoj. Aliaj laŭdis en artikoloj. Kaj ankaŭ mi estis tre kontentigita.

Jen, do, la sentoj. La statistiko rakontas alie, tamen. Aliĝis nur 58 homoj: malpli ol en la antaŭa jaro, malgraŭ unu jaro da antaŭavertado (kontraŭ kelkmonata), pli ampleksa programo, koncerto, kaj starigo de postkongresaĵoj. Do, ĉu sukceso? Laŭ la kvalito, sendube. Tamen kvante? Bedaŭrinde ne.

Tim Owen

Brazila Kongreso: “Esperanto kaj indiĝenaj lingvoj”

La 60a Brazila Kongreso de Esperanto okazis de la 4a ĝis la 7a de junio 2026 en la urbo João Pessoa, ŝtato Paraíba. Ĉirkaŭ cent kongresanoj el diversaj regionoj de Brazilo partoprenis la eventon, kies ĉefa temo estis “Esperanto kaj indiĝenaj lingvoj, rezisto kaj batalo kontraŭ lingva hegemonio”.

La kongreso okazis samtempe kaj kune kun la 44a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, la 27a Nordorienta Renkontiĝo kaj la 13a Junulara Renkontiĝo de Nordoriento, kio pliriĉigis la programon kaj ebligis dialogon inter diversaj generacioj kaj movadaj spertoj.

Unu el la plej emociaj momentoj okazis dum la malferma ceremonio. Membroj de indiĝena regiona komunumo estis invititaj por prezenti siajn spertojn kaj pripensojn pri lingva rezisto, kultura identeco kaj la graveco de la konservado de indiĝenaj lingvoj. Iliaj vortoj profunde tuŝis la ĉeestantojn kaj donis fortan signifon al la kongresa temo.

La malfermo ankaŭ estis markita de koncerto de Tarcísio Lima, unu el la omaĝitoj de la kongreso. Alian specialan omaĝon ricevis Elísia Martins pro la longdaŭra laboro favore al Esperanto.

La programo prezentis grandan diversecon de temoj. Inter la prelegoj kaj aktivaĵoj estis diskutoj pri la efikeco de Esperanto, spertoj pri instruado de Esperanto en municipaj lernejaj retoj, elementoj de kariria lingvo, muziko kun virtuala partopreno de Flávio Fonseca, kurso pri la tupia lingvo gvidata de Ĵaboti kaj ronda konversacio pri la esperantista movado en Nordorienta Brazilo. Por spertaj esperantistoj, Wandemberg gvidis esperantlingvan konversacian sesion. Alia interesa momento estis terapia gimnastika agado kun Hildemar.

Grava atingo de la kongreso estis la starigo de la Eduka Komisiono, kiu celas plifortigi la agadon de Esperanto en la kampo de edukado. Sukcesplene okazis ankaŭ KER-ekzameno: 13 kandidatoj partoprenis, kaj 11 el ili atingis aprobon; aplaŭdo al Aristophio Filho, komisiito de ILEI ĉe tiu grava laboro.

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:
https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Dulanda kongreso en Olomouc

La Ĉeĥa-Germana Esperanta Kongreso okazis de la 22a ĝis la 25a de majo 2026 en Olomouc (germane Olmütz), Ĉeĥio. La ĉeforganizantoj estis Jirka Tomeček kaj Mirka Tomečková, jam konataj kiel organizantoj de la pasintjara UK en Brno.

La kongreso okazis en la restoracio “Fontana”, nomita laŭ la granda fonto antaŭ la pordo de la kongresejo, situanta en granda parko. La varma vetero estis granda avantaĝo de la kongreso. Dum unu nokto la kongresanoj sidis en la parko kaj trinkis la restaĵojn de la ĵus okazinta vingustumado.

Vendredvespere prelegis Ewald Schick pri la 111a Universala Kongreso en Graz. Sabate antaŭtagmeze okazis la asembleo de GEA kaj de AGEI. Krome en sabato Lu Wunsch-Rolshoven demandis “Kion scias lingvistoj kaj ŝtatoficistoj?” koncerne al misinformado de Esperanto. Poste okazis gustumado de ĉeĥaj vinoj.

Dimanĉe Petr Chrdle montris al ni la mondajn heredaĵojn en la teritorio de Ĉeĥio. Poste Vladimir Türk prelegis pri la historio de la trampa movado en Ĉeĥio. La adiaŭaj prelegoj estis de Mirka Tomečková “Dezerto en ni” kaj Jirka Tomeček “Historio de la regiono”.

Dimanĉe okazis ekskurso al Svitavy kaj Česká Třebová. En Svitavy Libuše Dvořáková gvidis nin tra la Esperanto-Muzeo. Posttagmeze ni konatiĝis kun la apuda urbo Česká Třebová. Nin bonvenigis Jitka Peková, vicdirektorino de la urba muzeo de Česká Třebová.

En la kongresurbo Olomouc mem okazis urbovidado kaj memorigado pri la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso, okazinta ĉi tie en majo 1932.

Andreas Diemel

Granita, pli ol dumetra memorŝtono pri la apuda Esperanto-arbo (Liriodendron), plantita okaze de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-kongreso en Olomouc en 1932, en la parko Smetanovy sady en Olomouc. (Foto: Dirk Huthmann)

Fervojistoj kongresis en Serbio

Ĉi-jare la kongreso de esperantistoj-fervojistoj (… kaj amikoj de fervojo) okazis en bela balkana lando Serbio. De la 23a ĝis la 30a de majo renkontiĝis ĉirkaŭ 70 kongresanoj el 14 landoj: unue en Beogrado por solene inaŭguri la kongreson, ĝui prezenton de tradiciaj kantoj kaj promeni en la centro de belega Beogrado. Por entuziasmuloj estis interesa vizito de loka fervojmuzeo kun raraj eksponaĵoj.

Post kvarhora busveturado ĉiuj kongresanoj translokiĝis al Mokra Gora en okcidenta parto de la lando, kie bonvenigis nin ĉarma samnoma fervojstacio kun ĉio necesa por labora kaj distra partoj de la kongresa programo. Krom la kunvenoj kun raportoj pri agado de IFEF kaj ĝiaj landaj asocioj en 2025 estis diskutataj situacio en diversaj landoj kaj problemoj de la nuntempa stato de la fervojista Esperanto-movado. Aperis kelkaj novaj instigoj kaj proponoj kiel plibonigi laboron de la federacio kaj plivigligi movadon en landaj asocioj.

Neforgesebla estis la veturado per etŝpura trajno (760 mm) tra fervojlinia sekcio “Šarganska osmica” (Šargana oknumero) inter Mokra Gora kaj Šargan Vitasi, kiu ricevis sian nomon laŭ la formo de ĝia traceo kiu similas la ciferon 8. Sur 15 km de la linio la trajno trairas 22 tunelojn kaj 5 pontojn kaj atingas nivelon 235 metroj pli alte ol Mokra Gora. Dumvoje estas belegaj vidoj al najbaraj montetoj kaj valoj.

Proksime de la kongresloko troviĝas Drvengrad (Lignourbo) – unika kultura kaj etna vilaĝo, kiun konstruigis la fama serba filmreĝisoro Emir Kusturica por sia filmo “La vivo estas miraklo”. Oni povas tie ĝui etoson de la vivo en antikva vilaĝo kaj rememori la filmon mem.

La kulturan programon dum vesperoj brile plenigis Nedeljka Ložajić, Saša Pilipović kaj Zlatoje Martinov.

La lasta tago de la restado en regiono de okcidenta Serbio estis dediĉita al tuttaga ekskurso en ĉirkaŭaĵo. Traveturante montaran pejzaĝon kongresanoj plej frue vizitis faman serban monaĥejon Rujan – lokon, kie en la 16a jarcento estis presita la unua serba libro. Fortan impreson por ili kaŭzis vizito de “Podpećka pećina” (groto Podpećka) – ĝia grandeco, riĉa dekoraciaĵo per multformaj stala-ktitoj/gmitoj/ktatoj kaj eĉ historia senco por ĉirkaŭaj loĝantoj dum pasinteco.

La organizantoj de la kongreso sub la gvidado de Nedeljka Ložajić meritas sincerajn dankojn.

Ladislav Kovář

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Kulturo



Toño del Barrio en sia recenzo pri la Senkeviĉa romano “Quo vadis”, tradukita antaŭ preskaŭ cent jaroj de Lidja Zamenhof kaj prilaborita kaj komentita de Sergio Pokrovskij, metis kelkajn demandojn pri la prilaborita traduko. Sergio Pokrovskij afable konsentis respondi liajn demandojn. Legu ambaŭ tekstojn en nia kultura sekcio (kaj la verkon mem!).

Turka marŝo

de Paulo S. Viana

Je sia dek-kvar-jara aĝo, la knabo apenaŭ povis apreci la Turkan Marŝon. La misteroj de Mozarto ankoraŭ kaŝiĝis trans la muroj de la apartamento. Sed tio estis komenco. Lia patrino, kruda en sia patrineco, konservis en sia interno ian delikatecon, kiu esprimiĝis muzike. Ŝi plenigis la vizitĉambron per Betovenoj, Baĥoj, Ŝopenoj kaj Bramsoj, kiujn nun – post kvindek jaroj, aŭskultataj per pli ol duonjarcentaj oreloj – li rigardis kiel subtilajn kompensojn al ia stumpa amo. Tiuj estis vinilaj sondiskoj, kiuj tuj prezentis novajn sibilaĵojn zumantajn sur sonoj, kiujn li ne plene kaptis, en sia simplanimeco. Li neniam tute perdos tian simplanimecon. La Alla Turca tamen troviĝis je lia atingebleco.

La pasio de la patrino estis muziko. Neniu en la familio akompanis ŝin en tiu ekstazo, kiu vekis la tutan familion frumatene – ŝi neniam eliris al la laboro sen almenaŭa movimento de sonato, aŭ adaĝo, aŭ violona solo. La knabo komprenis en si mem, ke li loĝas en granda muzikskatolo, al kiu ŝi strečis la risorton. La ceteraj loĝantoj nur paŝis interne kiel ornamfiguroj, kiel en ĉiu muzikskatolo.

Por ŝi estis granda ĉagreno, ke neniu en la familio akompanas ŝin en la transcendo mistera de muziko. Kompatinda soleca patrino, meze de krudaj, nesentemaj viroj. Ne mirinde, ke ŝi fariĝis kolerema, resenta, foje feroca. La knabo sentis sin kulpa, ke li ne donas al ŝi iom da muzika talento praviganta lian alvenon al ĉi tiu mondo.

Unu tagon, li decidis, ke lia preferata muzikinstrumento estas la gitaro. Portebla, facile alirebla, agrable kurba, milde sonanta kun malmultaj sentoeksplodoj. Gitaro. Kiu scias, ĉu li povus lerni gitarludadon? Kiam li parolis pri tio, post multaj hezitoj kaj ĉirkaŭturnoj, li rimarkis, ke en la okuloj de la patrino ekbrilas ia lumo, neniam antaŭe vidita sen sonado de Betovenaĵo. Fine, la ido donas ian plezuron al sia patrino! Tiu estis senrevena paŝo. En la sekva tago, la patrino dungis gitarinstruistinon. Kaj ŝi alportis, reveninte el la laboro, belegan gitaron de fama marko, el ora lignaĵo, kun fajnaj agordŝraŭbiloj kaj ornamitaj borderoj. Tio lin iom timigis, sed li nepre eksentis

ian raviĝon, kiam li duonvidis la misteron de muziko en la senluma interno de la resonujo.

Hodiaŭ – post kvindek jaroj – li bone memoras la unuan lecionon, en la apartamento de la instruistino, ĉe proksima strato. Ŝi estis juna sinjorino iom pli ol tridekjara. Malhelblonda, maldika, altastatura, iom kurba, milda je gestoj kaj paroloj. Kaj kun profundaj, melankoliaj okulaj blurandoj. Ŝi akceptis lin simpatie, sen vervo. Ŝi havis kavan sed dolĉan voĉon, kaj longajn, maldikajn manojn. Ŝi klarigis sian muzikan metodon kaj ili tuj komencis la unuajn instrukciojn. Ekde tiu inaŭgura momento, la knabo eksciis, ke tio ne prosperos. Liaj manoj ne kongruis kun tiu lignaĵo. Ankaŭ la instruistino tion rimarkis, certe. Li lernis la sonkombinojn, la sonoj lin ne penetris; li vibrigis la kordojn, la kordoj ne lin resonis. Sekvis semajnoj, la lecionoj ne montris progreson, sed li ne rezignis. Kiel aŭdaci?

Tiam li perceptis, ke krom tio, ke li ne povis elrevigi la patrinon, li komencis alkutimiĝi al la dolĉa ĉeesto de tiu malĝojeta instruistino, kun ĉirkaŭokulaj bluaj makuloj kaj longaj koloraj jupoj. Kiam li premis la tintilon, la knabo petis eniron en alian mondon, kvietan, kie oni nenion postulis de li, eĉ se li mismetus la fingrojn sur la kordojn. Foje regis silento inter ili ambaŭ, ŝi kontempladis la ĉambrajn kurtenojn, li rigardis la mildan vizaĝon de la junulino. La lecionoj daŭris unu rapidan, ĉiam tro efemeran horon. Ne estis muzika progreso, sed estis ia plezuro.

Foje la instruistino kantetis, dum li sin ekzercis pri iu sinsekvo da fingropozicioj. Tiuj estis la plej bonaj momentoj. Li paradokse hontis, rigardante ŝiajn silkajn pantoflojn, kvazaŭ estus li la kantisto kaj ŝi la instrumentisto. Sed li neniam akceptis la inviton kanti mem iun kanzonon. Li ĉiam ruĝiĝis.

Tio daŭris unu jaron. La patrino neniam petis, ke li montru la lernitaĵojn, sed la streĉo pliiĝis, pro la ebleco pri tia peto. Alvenos momento, kiam li devos malkaŝi la veron: forperdita mono.

Li ne kuraĝis, li mem. Li nur komencis malĉeesti la lecionojn, sen klarigoj. Nek la instruistino, nek la patrino, nek la gitaro demandis lin pri la kialo. La fina decido konkretiĝis en la tago, kiam, post unu jaro da semajnaj lecionoj, li rimarkis, ke li ne sukcesas eĉ agordi la muzikinstrumenton. Eĉ ne kun la tuta dolĉa pacienco de la blondeta junulino kun makuloj ĉirkaŭ la okuloj. Restis ia neklara resopiro.

Ankaŭ la patrino nenion diris, post lia rezigno. Ŝi metis en la diskludilon la Apassionata-n.

Ĝis nun, post kvindek jaroj, li konservas la mutan gitaron. Tre belan.

Promenado en la parko

de Debra Hamel

La parko estas kvieta, senhoma krom mi. Tamen averte krias sciuro ie en la branĉoj super mia kap—

Korekto! La parko *estis* senhoma. Mi staras en la herbo kun mia hundo Sadja, dum ŝi preparas sin feki — kaŭrante kiel ĝermofobiulino super publika neceseja sidejo. Mi atendas, spektante ŝin, kaj subite okulflanke vidas viron nur du metrojn for. Mi ekkrietas pro surprizo. Li vere devis ŝtelpaŝi tien kiel kato.

“Pardonu min”, li diras. “Mi ne intencis timigi vin.”

Li ne plu proksimiĝas, nur staras rigardante min scivoleme.

Fakte, li rigardas min intense, kvazaŭ studante kuriozan specimenon. Mi supozas, ke mi same studas lin, ĉar li aspektas iel… nenormala. Ne kiel la homoj, kiuj frekventas la parkon — la kurantoj, la hundopromenigantoj; ne kiel ĉifonulo; ne kiel iu ajn, kiun mi antaŭe vidis. Ĉio pri li estas iom stranga.

Mi kapgestas responde al li, singarde.

Sadja ne aŭdis mian krieton. Kiel multaj Dalmataj hundoj, ŝi estas surda. Tamen ŝi certe vidas la viron. Ŝi rigardas lin rekte, sed ial restas indiferenta. Kia gardhundo! Kaj ŝi ankoraŭ fekas — mia senutila, konstipita hundo! La ŝnuro do ankras min surloke. Alie mi paŝus for de tiu strangulo kiu staras tiom proksime.

La viro aspektas kiel dironta denove, kaj mi scivolas, ĉu li eble memorigos min pri purigado post mia hundo. Tio estus pli bone ol la alternativo — egale verŝajne, laŭ mi — ke li celas fortiri min en la apudan arbaron kaj seksperforti min.

“Mi”, li komencas, kaj li zorge ekrigardas ĉirkaŭe — kontrolante, mi supozas, ĉu ni ankoraŭ estas solaj. “Mi ne scias, kie estas mia ĉevalo.”

“Ho”, mi diras, ĉar tion mi certe ne atendis. Ne temas do pri feko, sed la alia opcio restas ebleco. Mi vere ne volas havi konversacion kun li. Tamen Sadja daŭre fekas — kio pensigas min, ke se mi travivos hodiaŭ, mi vere devos ŝanĝi ŝian manĝon.

“Mi ne vidis lin”, mi diras. “Aŭ ŝin.”

“Plej bone, ke mi serĉu”, li diras. “Ĉu vi hazarde scias, ĉu estas ie proksime akvo?”

“Nu…”

Estas akvo ĉie, mi pensas. Ekster la parko estas civilizacio — butikoj kaj benzinejoj. Oni povas aĉeti akvon en boteloj, purigitan aŭ de fontoj en Majno aŭ Nov-Meksiko. Kian akvon li volas? Sed mi nur diras: “Estas akvofonto proksime al la alirejo de la parko”. Kaj mi kapgestas al la pavimita pado, kiu kondukas al la parkejo. Tiun mi povas vidi: jen mia aŭto, la sola tie.

“Plej bone, malprofunda rivero”, li diras.

Kaj tio senparoligas min. Kion diable li celas?

“Ĉu norden?” li sugestas. “Okcidenten?”

Lia brovo kuntiriĝas. Li aspektas tiel konfuzita, kiel mi sentas min. Sadja dume ĝoje piedbatas turfon per la postaj piedoj por malefike kovri la fekon. Finfine.

Verŝajne malsaĝe — ĉar ĝuste tiel virinoj fariĝas mortintaj — mi diras:

“Ĉu vi volas vidi mapon?”

“Vi havas mapon, ĉu vere?” li diras, kvazaŭ estas strange havi mapon enpoŝe nuntempe. Nu, evidente li ne havas.

Mi elpoŝigas mian poŝtelefonon kaj malfermas la apon Guglo-mapoj, kaj kiam mi ekrigardas supren, mi vidas, ke li fiksrigadas ĝin malfermbuŝe. Kiel stranga viro, mi pensas, sed ĝuste tiam mi eksentas min kapturna. La detaloj de lia vizaĝo ekas ŝanceliĝi, kvazaŭ mi rigardas lin tra la varma aero leviĝanta super pavimo dum la somero. Kaj la arboj kaj arbustoj kaj herbo ĉirkaŭe ekas volviĝi naŭzige.

Kiam la turniĝo fine ĉesas, surprizas min, ke mi ankoraŭ staras en la sama loko, ke mi ne kuŝas sur la grundo. Sed mi tieas, kaj li tieas, kaj mirinde, lia ĉevalo tieas — nepre virseksa, kaj nigra-blanka kiel mia Sadja. Sed ŝi ne estas tie — nek la pavimita pado, nek mia aŭto en la foro. Kaj pli proksime, la feko, kiun Sadja tiel feliĉe provis kamufli, ankaŭ estas for.

“Mi trovis mian ĉevalon”, la viro diras.

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

“Kien ci iras?” Ĉu Nova versio aŭ nova traduko?

Sienkiewicz, Henryk. Kien ci iras? Romano pri la tempo Nerona / Tradukis el la pola Lidja Zamenhof; Prilaboris kaj komentis Sergio Pokrovskij. – Kaliningrado: Sezonoj, 2026. – 622 p. – (Literatura suplemento al “La Ondo de Esperanto”, 2025).

Komence de 2026 la eldonejo “Sezonoj” lanĉis novan version de la klasikaĵo de Henryk Sienkiewicz, kiun kun la nomo “Quo vadis” tradukis el la pola lingvo Lidja Zamenhof en la tridekaj jaroj. La nova eldono aperas nur en bita versio, kiel literatura suplemento al “La Ondo de Esperanto”, kun ampleksa prilaborado de Sergio Pokrovskij kaj kun nova titolo: “Kien ci iras? Romano pri la tempo Nerona”.

Mi ne komentos tie ĉi la verkon mem, kiun probable konas ĉiuj legantoj, ĉu pro la multnombraj tradukoj, aŭ plej probable pro la samnoma sukcesega holivuda filmo. Ankaŭ la tradukon mem de Lidja Zamenhof mi ne recenzos nun. Ĝi estas ankaŭ sufiĉe konata, kvankam mi devas agnoski, ke mi ne estis ĝin leginta ĝis nun, kaj ne mi estas la adekvata homo por reveni al tiu eldono.

Mia celo estas komenti ĉefe la nunan adapton pri kiu respondecas Sergio Pokrovskij, interalie ĉar ĝi levas iujn interesajn demandojn pri kiel agi kiam oni entreprenas reeldonon de malnova verko, kaj ĝis kiu grado oni rajtas aktualigi kaj modifi pasintan version. Mi faras tion ĉar mi mem frontis tiujn demandojn antaŭ du jaroj, kiam mi editoris la verkon “Volontuloj kun okulvitroj” (SAT-en-Hispanio, 2024), en kiu ni inkludis novan eldonon de “La hispana tragedio”, de la nederlanda verkisto Jef Last, eldonita en 1938, dum la hispana intercivitana milito, en traduko de G. J. Degenkamp. Mi frontis iujn similajn demandojn kiujn ankaŭ Sergio trovis, kaj aliajn malsamajn, kiel la klarigadon de eventoj kiujn moderna leganto konas malpli, aŭ erarojn en la transkribado de alilingvaj vortoj (ĉikaze hispanaj, en kiuj svarmis eraroj).

Mi devas diri jam dekomence, ke mi mem estis multe pli konservema, kaj ke mi (kun ceteraj kunlaborintoj) decidis tuŝi minimume la originalan verkon. Ni enkondukis plurajn piedpaĝajn notojn, korektis erarajn vortojn, ankaŭ de geografiaj lokoj kaj personaj nomoj, kaj forigis difinojn de vortoj kiuj intertempe aperas en PIV, por citi kelkajn ekzemplojn. Mi provis fari tion iom ŝpareme, kaj tiel povas esence diri ke la traduko plu restas tiu de Degenkamp, eĉ se ne cent procente el pure bibliografia vidpunkto.

La elekto de Pokrovskij estis alia. Li laboris surbaze de la traduko de Lidja, konsultis la polan originalon de Sienkiewicz kaj plurajn alilingvajn tradukojn, kaj

kiel konsekvenco li ofte modifis la originalan tradukon, inklude, frape, la titolon. Li klarigas siajn kriteriojn en epilogo en la libro, kaj pli longe en eseo en la reto https://kovro.heliohost.org/books/QV/antauxq.html.

En la sekvaj paragrafoj mi komentos kelkajn el tiuj modifoj, kaj miajn (tute personajn) taksojn pri ili. Sed mi jam dekomence levas la demandon: ĉu oni rajtas diri ke la traduko restas de Lidja, kiel la eldono asertas, aŭ ĉu temas pri alia traduko?

Klarigoj kaj esperantigoj

Unu el la ĉefaj plibonigoj en la nova eldono estas la aldono de multaj notoj kaj klarigoj pri realaj personoj kaj eventoj, kaj pri la historia fono. Ili aperas kiel piednotoj kaj kiel finlibraj klarigoj kaj listoj. Tiu aspekto estas opiniinda en la kazo de romano, ĉar multaj legantoj preferas ne renkonti tiom da notoj en la rakontado, por eviti interrompojn en la fluo de la legado — kaj pri tio mi atentigas la estontajn legantojn. Mi mem bonvenigas la notojn: ili estas kleraj kaj klaraj, kaj multe helpas en la komprenado de nuancoj. Mi nur ne trovas tre evidentan kriterion pri la elekto inter notoj piedpaĝaj kaj en la fino de la libro, kaj do eble estus pli ŝparema en la unuaj (mi uzis la pdf-version, ĉar mi havis problemon en la konvertado de la epub-versio adaptita al legiloj, kion eble ankaŭ aliaj legantoj renkontos).

La nova eldono modifas la personajn nomojn, ĉu esperantigante iujn kiuj aperis en la originala lingvo, ĉu modifante iujn versiojn de la originala traduko. Mi bonvenigas tiun koherigon, kaj trovas ĝin multe pli klara kaj flua. Mi aparte bonvenigas la forigon de la finaĵoj en –us(o) kaj –um(o), ekz. Vinicio anstataŭ Vinicius(on), sendube influite de tio ke mia denaska latinida lingvo jam de jarcentoj faris tiajn simpligojn. En kvazaŭlatinida lingvo kiel Esperanto, tio ŝajnas logika elekto.

Problemo tamen (kiel ofte en aliaj esperantaj verkoj) troviĝas en la esperantigo de la inaj nomoj. La nova versio ofte esperantigas konservante la formon finiĝantan per –a (Ligia, Popea, Pomponia). Tamen ĝi ne estas tiom kohera kiom ĉe iĉaj nomoj. Oni konservas finajojn en –e, por grekdevenaj nomoj (Eŭnike), kion mi pretas akcepti ĉar ĝi lasas iun specialan guston pri tiu deveno. Ne tiom ĉe hebreaj nomoj, kaj mi agnoskas ke mi ne trovas konvinkaj la kialojn por uzi la formon Marjam' anstataŭ la de ĉiam enradikiĝinta Maria. Sed estas eĉ malpli pravigeble, kaj foje eĉ konfuzige, kiam oni esperantigas per finaĵo en –o. Ekz. ĉe diinoj, kial ŝanĝi Vesto-n al Vestao, kaj ne simple Vesta; same, se vi ŝanĝas Maio-n al Majo, kial ne Maja. Kaj pli frape, oni ŝanĝas la duan nomon de la ĉefrolulino, Callina al Kallino; simpla kohero kondukus al pli klara Kallina.

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

La respondo de Sergio Pokrovskij

Mi dankas al *Toño del Barrio* pro lia intereso al mia laboro kaj pro tio, ke li bonvolis esprimi ĝin per recenzo.

1. Kio estas «prilaboraĵo»

Toño: [La nuna adapto] levas iujn interesajn demandojn pri kiel agi kiam oni entreprenas reeldonon de malnova verko, kaj ĝis kiu grado oni rajtas aktualigi kaj modifi pasintan version.

Pri tio ne estas unu universala respondo, necesas atenti la rolon de la verko en nia literaturo, la kvaliton de la traduko kaj decidi, kion oni rigardas valora kaj purigenda en la teksto. Mi donu kelkajn ekzemplojn.

1.1. La neĝa blovado

En la jaro 2004ª «Sezonoj» eldonis mian prilaboraĵon de tiu novelo de Puŝkino tradukita de Antoni Grabowski. Mi tre ŝatas tiun tradukon, ĝi estas unu el la malmultaj verkoj de la frua periodo kiuj restas pli bonaj ol la postaj «pli maturaj» retradukoj. Ĝia komenca peco aperas en la hungara «Baza literatura krestomatio» kiel klasikaĵo de Esperanta literaturo. Kaj tamen ĝi entenas malgravajn diferencojn kaj gravajn erarojn, kiuj povus misinflui lernantojn, ekz-e ~~*oficero*~~, ~~*postiliono*~~ anstataŭ la nun normajn *oficiro*, *postiljono*; ~~*edziĝi*~~ ĉe ina subjekto anstataŭ *edziniĝi* ktp. Tiojn mi korektis kaj apartigis la korektojn per maldensa tiparo, por ke eventuala esploranto de la Esperanta literaturo povu distingi, kiu peco apartenas al Grabowski, kaj kiu al la redaktinto.

1.2. La batalo de l' vivo

La Zamenhofa traduko de tiu novelo Dikensa estas tre frua (1891), probable ĝi estas la dua beletraĵo tradukita en Esperanton. Atentindas ke Zamenhofo tradukis ne rekte el la angla, sed de ne ĉiam ĝusta germana traduko.

En la jaro 1910ª en Londono aperis la 2ª eldono, pri kies estiĝo rakontas ĝia Antaŭparolo. Ĝia teksto estas multloke korektita (laŭ permeso Zamenhofa) kaj konsiderinde plibonigita. La korektoj (pli ol 300) koncernas kaj la tradukajn ĝustigojn rilate al la angla originalo, kaj la gramatikajn korektojn de lingvaĵo Esperanta. La korektoj de la britaj eldonintoj estas bonaj kaj aprobindaj; ili ne estas iel ajn markitaj en ilia teksto.

En la jaro 2018ª mi decidis prilabori «La batalon». Tie necesis kompreni, kio pli gravas: ĉu la Zamenhofa traduko (Zamenhofo ja pli ĝuste esperantigis la germanan mistradukon ol la germana tradukisto germanigis la anglan originalon). Por esperantologio pli gravas la Zamenhofa maniero esprimi la donitan (do, la germanan) enhavon; sed ordinara leganto pli probable komparos la Esperantan tekston kun

la facile trovebla angla originalo ol kun la forgesita traduko de *Julius Seybt*. Kompromise mi adoptis kiel bazon la korektitan Londonan eldonon, en kiu mi faris 108 pluajn korektojn. La Londonajn korektojn mi komentis en la notoj kaj kompostis en senserifa tiparo (meze de la serifa tiparo uzata por la ĉefteksto): «la rastilo de muskato». Miajn kromajn korektojn mi kompostis en skribeska tiparo: «Alfred kun sia juna edzino» («sia» anstataŭ la erara «~~lia~~»). Ĉi tiun prilaboron partoprenis Brian Moon kaj B. Pabst.

1.3. *Quo vadis*

Mi ne parolos pri tio, kial mi opinias la tradukon de tiu romano modernigenda: tion mi detale klarigis en la Postparolo de mia prilaboraĵo [KE], kaj pri tio Toño ne demandas.

En la traduko de Lidja Z [QE] la Esperanta komponanto ne estas tiom eminenta, kiel en la du ĵusaj ekzemploj. Ĝi estas aprezata ne kiel parto de la Esperanta literaturo, sed kiel fama romano de la monda literaturo. Tial mi opiniis konvena ne nur korekti ĝiajn erarojn kaj arkaikaĵojn, sed ankaŭ ĉiel plibonigi la tradukon kaj adapti ĝin al la kultura horizonto de la modernuloj.

Toño: Sume, ĉu tiun ĉi ni plu povas konsideri la traduko de Lidja Zamenhof ?

Grandparte la prilaboraĵo ja restas la traduko de Lidja. Sed mi ne prezentas ĝin kiel «tradukon fare de Lidja Zamenhof», mi prezentas ĝin kiel ***prilaboritan tradukon***. Tutcerte pli bone estus simple fari novan tradukon, kiel mi finfine faris pri Voltera «Kandido» (unue mi intencis nur prilabori la Lantian tradukon). Sed ĉi-okaze min malhelpis obstaklo. En la romano ja estas la paganismaj epizodoj verkitaj verve kaj surbaze de abundaj historiaj fontoj, la epizodoj kiujn mi prilaboris kun granda plezuro; sed krome estas granda parto (proksimume kvarono) priskribanta la frukristanan komunumon kaj la ĉefapostolojn. Sendube iuj legantoj ŝatas tiun parton, sed min ĝi tedas kaj ĝenas pro siaj trajtoj anakronismaj kaj edifaj. Tial mi traktis tiun parton ĝuste tiel, kiel rekomendas Toño: kiel eble plej konserveme, nur korektante la erarojn kaj koherigante ĝin kun la resto de la prilaboraĵo (la nomoj ktp). Escepto estas la titoldona epizodo, priparolota en 6.

La traduko [QE] jam estas publika havaĵo, tamen necesas atenti etikajn konsiderojn. Mi faris proksimume tiel, kiel oni faras en la mondo de libera programaro: mi referencis la originan tradukon — ne por logi la publikon per la familinomo «Zamenhof», sed por agnoski la aŭtorecon de la uzita materialo; mi indikis, ke la origina traduko estas modifita (prilaborita); kaj mi eĉ ŝanĝis la titolon.

Toño: En la eseo oni kritikas la modifojn de antaŭa reeldono, tiu de INKO, trovebla en la reto, sed la nuna ŝanĝas la tekston notinde pli ofte.

Du rimarkigoj:

1. INKO ŝanĝis la tekston senaverte.
2. La ŝanĝoj de INKO ofte forviŝas nuancojn (plej evidente, la verbajn aspektojn);

la ŝanĝoj en la prilaboraĵo precipe celas forigi la erarojn, esprimi nuancojn, glatigi la stilon.

La lasta estas iom subjektiva. Supozeble en la opinio de INKO-redaktisto forviŝo de la verbaj aspektoj estas «pliglatigo», dum por mi tio estas perdo.

Toño: … ĉu oni rajtas uzi vorton kiun la originala tradukinto eĉ ne konis, kaj plu aserti ke la tradukinto plu estas Lidja?

Mi ja klare diris, ke la prilaborita teksto estas modifita, kaj ke ĝi *nur parte* estas traduko de Lidja. Mi ne prezentas ŝian (eĉ se partan) aŭtorecon kiel meriton kaj logilon; mi nur lojale agnoskas kion mi ŝuldas al ŝia laboro. Ne fari tion estus plagiati.

2. Ĉu pied- aŭ finnoto?

Toño: Mi nur ne trovas tre evidentan kriterion pri la elekto inter notoj piedpaĝaj kaj en la fino de la libro…

Principe la kriterio estas: kio necesas por bone kompreni la tekston aperu paĝopiede. Kio estas krominformo por la interesatoj (aŭ estas iom longa), aperu fine. Iam la noto estas duparta, kun la nepraĵo piede kaj kromaĵo fine.

Ekz-e la unuan vorton de la romano, «Petronio», akompanas du notoj. La piednoto citanta PIV-on helpas identigi la romanpersonon kun historia figuro kaj atestas pri tradicio asimili ties nomon. La finnoto informas, ke en la historiaj fontoj estas 3 mencioj pri homo(j) kun tiu gentonomo, kun 2 malsamaj antaŭnomoj; do, povas temi pri 2 aŭ 3 homoj, aŭ pri unu sama homo kun erare indikita antaŭnomo. La lasta opinio estas la plej ofta kaj ĝin implicas la romano kaj la PIV-oj.

Por ordinara leganto la finnoto estas superflua kaj eble eĉ malutila (pro ĝi la rakonto impresas malpli fidinde); sed iujn legantojn tio povas interesi.

Krome, finnote eblas indiki motivojn por certaj tradukdecidoj, interesajn nur por literaturistoj.

3. Innomoj

Toño: Problemo tamen (kiel ofte en aliaj esperantaj verkoj) troviĝas en la esperantigo de la inaj nomoj. La nova versio ofte esperantigas konservante la formon finiĝantan per –a (Ligia, Popea, Pomponia). Tamen ĝi ne estas tiom kohera kiom ĉe iĉaj nomoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Mozaiko



Estas tiel varmege ĉi tie, ke oni povus rosti blankan urson!ᶻ

Edzino demandas sian edzon, revenintan de bazaro:
– Kial vi aĉetis tiom da rosinoj?
– Tiutempe tioj ankoraŭ estis vinberoj!

Du amikinoj babilas en Parizo meze de julio:
– Ĉu ni promenu hodiaŭ?
– Tro varme, prefere poste.
– Kiam?
– Nu, eble en novembro…

Kuracisto admonas anhelantan viron:
– Dum varmego necesas konsumi pli da likvaĵoj.
– Sed kiel klarigi tion al mia edzino? Hieraŭ ŝi denove forpelis min el la bierejo!

En la urbo ankaŭ eblas sen mapo kaj kompaso facile kompreni kie estas la sudo – trovu la muron kun plej multaj klimatiziloj.

Ekzekutisto kondukas la kondamniton al pendumilo kaj tiu lamentas:
– Terure, kia varmego….
– Vi ankoraŭ plendas! Post unu minuto vi sentos nenion, sed mi ankoraŭ devos marŝi reen!

Generalo klarigas al Hitlero:
– Ni malsukcesis vintre sturmokupi Moskvon, ĉar estis 40 gradoj sub nulo.
– Sed sekvajare somere estis 40-grada varmego kaj vi denove malsukcesis!
– Nu, evidente 40 gradoj ĉiam estas oportunaj por la rusoj…

Leginte veterprognozon, edzo ĝoje krias al la edzino:
– Oni promesis nur 30 gradojn por tiu ĉi semajnfino!
– Kial vi ĝojas, ja la varmego daŭros?
– Vi ne komprenas, kara: 15 gradoj sabate kaj 15 gradoj dimanĉe!

La patro klarigas al la filo, kio estas inercio: “Rigardu, jam estas septembro kaj la varmego finiĝis. Tamen mia organismo plu postulas kvin bierojn ĉiutage!”

Plej trafa difino de la aŭtuno: periodo de la jaro, kiam oni ĉesas plendi pri varmego kaj komencas plendi pri malvarmo.

Plukis kaj tradukis **Stano Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Minacas svagaj drinkideoj

… oni rajtas drinki alkoholaĵojn… Tiu ĉi dispenso estas danĝera… (Roman Dobrzyński: Romano pri Romano, PEA, 2025, p. 167)

Post manĝo kaj trinko, liko necesas

… multaj el ili ne komprenas politikon kaj volas nur manĝi, trinki, kaj havi ie vivlikon. (Helju Viires: Hejmen la rusoj ...? https://monato.be/1993/003522.php)

Urina problemo?

Post plia tago de interesaj kursoj, ĉiuj renkotiĝis en la granda salono… (Klara Wieland, Annika Weeser-Krell: Impresoj de JES 2025/26 en Burg (Spreewald), La Ondo de Esperanto, 2026, №1, p.11)

Sendube ne entube

Nuntempa teatro kompreneble estas verkita en la parola lingvo. Sed ne entube, ĉar la ĉiutaga konversacio estas plena je banalaĵoj, kiuj sursceneje estus nur tedaj. (Georges Lagrange: Pri la teatra lingvo, Hungara Vivo 1978, №6, p. 206)

Laŭ propra direkto

Dum pluraj jaroj mi laboris partatempe kiel memstrata profesiulo… (Konatiĝu kun Konrado, nova volontulo de TEJO; https://sezonoj.ru/2025/10/tejo-181/; rimarkis Ionel Oneț)

Kiel vi frtas?

Kálmán Mikszáth: Bonaj palocoj – Slovakaj kunfrtoj (https://libro.ee/file.php?id=4256, titola paĝo)

Bof…ronto?

… s-anino Bendová legis serion da prelegetoj pri la historio de Esperanto, pri Zamenbof kaj pri la unuaj E-kongresoj. (La kroniko de Esperanto en Prago, p. 18, https://bulteno.cs-retromusic.net/kroniko.pdf)

Interna infanteriano?

Aleksander Fredro… en 1809 ensoldatiĝis en armeon de Varsovia Duklando, poste estis en Grande Armée de Napoleono.(https://eo.wikipedia.org/wiki/Aleksander_Fredro, stato 26 jun 2026)

Plukis **István Ertl**

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeĵda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Jana Zigal. Rete: peranto@esperanto.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Viloresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tôkyô-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornella de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Svedio: Sveda Esperanto-Federacio, Ann-Louise Åkerlund. Rete: peranto@esperantoforbundet.se.

Usono: Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103. Rete: eusa@esperanto-usa.org.

Oni povas pagi la abonon ankaŭ al nia UEA-konto “avko-u” kaj per la internacia pagosistemo PayPal ĉe https://paypal.me/GGORETSKIY.

Ĝi estas demonstra versio de la 138-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm